
CXAPITRO 1 (UNU)

(En universitata restoracio)

Tom: Saluton, Linda.

Linda: Saluton, Tom.

Tom: Diru al mi: kiu estas tiu?

Linda: Kiu?

Tom: Tiu alta, blonda, juna viro...

Linda: Kiu?

Tom: Tiu, kiu sidas en la angulo.

Linda: Ho, tiu!

Tom: Jes, tiu.

Linda: Mi ne scias. Mi ne scias, kiu li estas. Nova studento, versxajne.

Tom: Li estas tute sola.

Linda: Ne. Rigardu. Bela knabino iras al li.

Tom: Ne bela. Juna, eble, sed ne bela. Nur vi estas bela, Linda.

Linda: Tom, kara! Kio okazas al vi? Eble vi laboras tro multe, kaj...

Tom: Nenio speciala okazas al mi. Kaj mi ne laboras tro multe. Fakte, mi laboras malmulte nun. La vera demando estas: kio okazas al vi, Linda? Nur vi estas vere bela.

Linda: Nu, nu...

Tom: Estas fakto. Nur vi estas bela, Linda. Mi estas sincera. Venu kun mi!

Linda: Sed...

Tom: Venu. Al la granda spegulo. Rigardu. Jen estas Linda, la plej bela virino en la mondo, la plej bela virino en la tuta mondo.

Linda: Kaj jen estas Tom, la plej malserioza knabo en la tuta universitato.

DEMANDOJ (1)

Diru al mi:

Kiu sidas en la angulo?

(Tom / Linda / blonda viro / juna knabino / maljuna viro)

Kiu iras al li?

(Tom / Linda / blonda viro / juna knabino / maljuna viro)

Al kio iras Tom kaj Linda?

(al la angulo / al la granda spegulo / al la nova studento / al la

blonda viro)

Kiu estas (eble) la plej bela virino en la mondo?

(Tom / Linda / blonda viro / bela knabino / maljuna viro)

Kiu estas (eble) la plej malserioza knabo en la universitato?

(Tom / Linda / blonda viro / bela knabino / maljuna viro)

EKZERCOJ (1)

Ekzemplo:

{ -a al -as grand- ir- mi -o spegul- }

---> Mi iras al granda spegulo.

Jen:

{ -a -as est- grand- li -o vir- }

{ -a -as en est- li -o restoraci- student- }

{ -a jen labor- nov- -o }

{ -a -as nenio nun okaz- special- }

{ -as bel- est- kio -o ? }

CXAPITRO 2 (DU)

Linda: Tom!

Tom: Kio okazas al vi? Vi estas pala! Bela, sed pala.

Linda: Tom! Ne rigardu!

Tom: Kio okazas?

Linda: Strange! Okazas io stranga, io tre stranga. Tiu ulo, tiu nova studento... Ne, Ne, mi petas vin, ne rigardu. Estu diskreta.

Tom: Diable! Diru al mi. Kio estas tiu mistero?

Linda: Lia mano agas strange. Rigardu, se vi volas, sed plej diskrete. Turnu vin iomete, eble, sed tute nature. Li ne vidu, ke vi rigardas al li.

Tom: Vi pravas. Io stranga okazas. Dum sxi ne rigardas al li -- sxi nun rigardas al la granda spegulo -- lia mano iom post iom, tre tre malrapide, proksimigxas al sxia taso...

Linda: Estas io en lia mano.

Tom: Mi ne vidas. Li estas tro malproksima. Diable! Tiu alta forta knabo nun staras inter ili kaj mi. Mi ne plu vidas.

Linda: Sed mi vidas. Mi vidas bone. Mi vidas tre bone. Mi vidas tute bone. Ej!

Tom: Kio okazas?

Linda: SXi rigardas al li nun, kaj lia mano haltas.

Tom: Kaj kio plu? Diru al mi!

Linda: Nun li parolas al sxi. Li montras al la pordo.

Tom: Eble li volas, ke sxi rigardu al alia direkto, ke sxi ne plu rigardu al li.

Linda: Prave, tute prave. Jen sxi rigardas al la pordo. Li plu parolas kaj parolas. Dum sxi ne rigardas al lia direkto, lia mano plu proksimigxas al la taso. Ej!

Tom: Kio? Kio okazas?

Linda: Lia mano revenas, tute diskrete, kvazaux tute nature.

Tom: CXu estas io en lia mano?

Linda: Nenio plu. Sed tute certe nun estas io en sxia taso.

DEMANDOJ (2)

Linda estas ____.

(malserioza / nova studento / bela kaj pala / io stranga)

Kio okazas?

(Linda rigardas al la spegulo. / Malalta viro staras inter Tom kaj la pordo. / La blonda viro agas strange. / La nova studento proksimigxas

al Tom.)

CXu estas io en lia mano?
(jes / ne)

Al kio montras la mistera ulo?
(al la spegulo / al la pordo / al Linda / al Tom / al la angulo)

Al kio rigardas la juna knabino, kiu estas kun li?
(al la spegulo / al la pordo / al Linda / al Tom / al la angulo)

CXu nun estas io en la taso?
(jes / ne)

EKZERCOJ (2)

Ekzemplo:

Turnu vin iomete, [cxu / se] vi volas.

---> Turnu vin iomete, se vi volas.

Jen:

Mi ne vidas, [cxu / se] la junulo parolas al la knabino, aux [cxu / se] li nur rigardas al sxi.

Vi vidas lin tute bone, [cxu / se] ne?

[CXu / Se] li agas strange, li estas strangulo.

Mi alparolas knabinojn, [cxu / se] ili rigardas al mi.

Mi ne scias, [cxu / se] mi alparolu sxin aux ne.

[CXu / Se] sxi parolas al mi, [cxu / se] mi reparolu al sxi?

Li estas en universitato, [cxu / se] li estas studento.

Mi ne certas, [cxu / se] li estas studento. Li estas tro maljuna.

CXAPITRO 3 (TRI)

Bob: Diable! Kio okazas? Vi aspektas kiel spionoj. CXu mi povas sidi kun vi?

Linda: Saluton, Bob.

Tom: Bonan tagon, Bob.

Bob: Bonan tagon, Linda. Bonan tagon, Tom. Pardonu, ke mi ne salutis vin tuj.

Linda: Ne gravas. Nun vi salutis, kaj ni pardonas vin.

Bob: CXu vi permesas, ke mi sidu cxe via tablo?

Linda: Kompreneble, vi sidu kun ni.

Bob: Mi tamen ne volas esti maldiskreta. Eble Tom parolas pri amo kaj preferas esti sola kun vi.

Tom: Mi ne parolis pri amo.

Linda: Li nur diris, ke mi estas la plej bela virino en la tuta mondo.

Bob: Li pravas. Tio ne estas amdeklaro, tio estas simpla fakto.

Tom: Prave. Simpla fakto.

Bob: Nu, certe, Linda estas tre bela, sed ne tio gravas nun.

Linda: Ne gravas, cxu? Ne gravas, ke mi estas bela, cxu? Jen bela deklaro!

Bob: Pardonu min. Mi volas diri, ke io estas pli grava.

Tom: Kio? Pri kio vi parolas? Kio estas pli grava?

Bob: Vi ne vidis min, dum mi proksimigxis al vi, sed mi vin rigardis.

Linda: Mi ne komprenas, pri kio vi parolas.

Bob: Mi parolas pri via vizagxo.

Linda: Kio pri mia vizagxo? CXu gxi ne estas bela?

Bob: Ho jes, gxi estas bela, gxi estas la plej bela en la mondo. Sed gxi estis mistera!

Linda: Mistera? CXu mia vizagxo estis mistera?

Bob: Jes. Via vizagxo estis mistera. Fakte, viaj vizagxoj estis misteraj. Mistera vizagxo de spionino cxe mistera vizagxo de spiono. Vi aspektis strange. Vi aspektis mistere. Mi bone rigardis vin, dum mi proksimigxis al vi, kaj estis mistera esprimo sur via vizagxo, Linda, kaj ankaux sur via, Tom. Kiel mi jam diris, vi aspektis kiel spionoj.

DEMANDOJ (3)

Kiuj aspektas kiel spionoj?

(Linda kaj Tom / Linda kaj Bob / Bob kaj Tom / Gerda kaj la blondulo)

CXu Bob salutas ilin tuj?
(jes /ne)

CXu Linda kaj Tom permesas, ke Bob sidu cxe ilia tablo?
(jes / ne)

Kiu ne volas esti maldiskreta?
(Bob / Tom / Linda / Gerda / la blondulo)

Kio estas sur la vizagxo de Linda?
(bela deklaro / bona tago / mistera esprimo / io pli grava)

EKZERCOJ (3)

Ekzemplo:

{ -as aspekt- cxu kiel la -o -o student- ul- ? }

---> CXu la ulo aspektas kiel studento?

Jen:

{ -as -bon- mal- ne -o pardon- -ul- }

{ -e -is mi post- re- -ven- }

{ -a- al -as -in- -j -j jun- knab- -o -o- parol- vir- }

CXAPITRO 4 (KVAR)

Bob: Diru al mi sincere, pri kio vi parolis.

Tom: Ni parolis pri tiu ulo.

Bob: Kiu ulo?

Tom: Tiu viro cxe la angulo. Tiu juna viro.

Bob: Pri kiu vi parolas? CXu pri tiu blondulo, kiu sidas kun Gerda?

Linda: Gerda! Vi do scias, ke sxia nomo estas Gerda! Vi do konas sxin!

Bob: Nu, mi ne vere konas sxin. Mi scias, kiu sxi estas. Tio estas alia afero.

Linda: Kiu do sxi estas?

Bob: Sed vi ne respondis al mi. Vi ne respondis al mia demando. CXu vere pri tiu blonda junulo vi parolis?

Tom: Jes. Pri li.

Bob: Mi ne konas lin. Mi neniam vidis lin antauxe.

Linda: Sed, diru al mi, kiu estas tiu Gerda?

Bob: SXi venis por instrui. Temas pri io mistera, fakte. Kriptajxoscienco.

Linda: Kio? Kiel vi diris? Krip-ta-jxo-sci-en-co, cxu? Kio estas tio?

Bob: CXu vere vi ne scias, kio estas kriptajxoscienco? Oni diras ankaux "kriptografio".

Linda: Ne. Mi ne scias. Mi tute ne scias. CXu vi scias, Tom?

Tom: CXu tio ne estas la arto kompreni, pri kio temas sekreta mesagxo?

Bob: Prave. Jen sxia fako. Fakte, sxia fako estas la malnovaj sekretaj lingvoj.

Tom: Mi ne komprenas. Kiu, en universitato, volas lerni pri la malnovaj sekretaj lingvoj?

Bob: Ankaux mi ne tute komprenas. Estis ideo de Ronga, la profesoro pri lingvistiko. Li konsideras, ke sekretaj lingvoj estas aspekto de la arto komuniki, kaj ke ili do rilatas al lingvistiko.

Linda: Eble jes. Eble li pravas. Kaj tamen tiu ideo estas iom stranga, cxu vi ne konsentas?

Bob: Jes. GXi aspektis strange ankaux al mi, kiam oni parolis pri gxi.

Linda: Eble Ronga, la lingvistika profesoro, nur deziris, ke bela virino kunlaboru kun li. CXu ne estas bona ideo kunlabori kun bela knabino, kiam tio estas ebla?

Tom: Mi jam diris al vi, ke sxi ne estas bela. Nur vi estas bela.

Bob: Mi ne konsentas. Estas fakto, ke Linda estas tre bela, ke sxi

estas la plej bela knabino en la mondo. Sed ankaux Gerda estas bela, iom malpli bela, sed tamen bela; cxu vi konsentas?

Tom: Tute ne. Por vi, eble. Sed por mi ne. Por mi, nur Linda ekzistas kiel bela virino.

Bob: CXu vi volas diri, ke por vi Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo?

Tom: Jes, por mi, Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo.

Bob: Diable! Vi versxajne amas sxin.

DEMANDOJ (4)

Respondu:

Pri kio Linda kaj Tom parolis?

(pri Bob / pri amo / pri la blondulo / pri kriptajxo-scienco)

Kiu sidas kun la viro, pri kiu Linda kaj Tom parolis?

(Gerda / Ronga / blonda junulo / Bob / neniu)

Kiu scias, kiu estas Gerda?

(Bob / Linda / Tom)

CXu Bob konas la blondulon?

(jes / ne)

Kion instruas Gerda?

(novajn lingvojn / lingvistikon / kriptajxo-sciencan)

Kiu estas profesoro pri lingvistiko?

(Bob / Linda / Tom / Gerda / Ronga / la blondulo)

Kiu estas la sola bela virino en la tuta mondo, por Tom?

(Gerda / Linda / Ronga / la knabino en la angulo)

EKZERCOJ (4)

Ekzemplo:

[Mi / Min] diris [tio / tion] al [vi / vin].

---> Mi diris tion al vi.

Jen:

[Ili / Ilin] demandas [mi / min].

[Multo / Multon] diras [li / lin] al la studentoj.

Al la studentoj li demandas [tio / tion], [kio / kion] [li / lin] ne scias, sed [ili / ilin] diras [nenio / nenion].

[Ili / Ilin] ne scias.

[Linda / Lindan] ne sidas sole. Venas [bela / belan] [junulo / junulon].

[Tio / Tion] certe estas la [universitato / universitaton].

La [studentoj / studentojn] montras al [mi / min] la [studenta / studentan] [restoracio / restoracion].

[Mi / Min] petas [vi / vin], diru al [mi / min] [tio / tion].

La [blondulo / blondulon], [kiu / kiun] staras en la [restoracio / restoracion], estas [stranga / strangan].

[Ili / Ilin] ne pardonas la [nova / novan] [studento / studenton].

[Li / Lin] ne komprenas. [Tio / Tion] estas [mistera / misteran].

[Li / Lin] preferas [sinceraĵ / sinceraĵn] [junuloj / junulojn].

CXAPITRO 5 (KVIN)

Bob: Nu, vi ankoraux ne diris al mi, kio okazis, dum vi spione rigardis tiun paron.

Linda: Okazis io vere stranga.

Tom: Vere stranga, fakte. En la mano de tiu junulo estis io.

Bob: Kio?

Linda: Ni ne povis vidi. Io tre eta. Malgranda afero. Afereto.

Tom: Kaj dum sxi ne rigardis, lia mano alproksimigxis al sxia taso.

Linda: Kaj kiam sxi ekrigardis lin, lia mano ekhaltis.

Tom: Tiam li montris ion al sxi. Evidente, li deziris forturni sxian atenton.

Linda: Kaj li sukcesis. Li plene sukcesis. SXi rigardis al la pordo. Kaj dum sxi rigardis for, lia mano subite estis super sxia taso, dum unu sekundo, ne pli, kaj tute nature revenis. Malplena.

Bob: CXu gxi estis plena antauxe?

Tom: Ne plena. Kompreneble, gxi ne estis plena. Sed estis io en gxi, kaj post kiam gxi estis dum sekundo super la taso de Gerda, estis plunenio en gxi.

Linda: Certe estas iu mistera substanco.

Tom: Iu drogo.

Bob: Kiel vi povas scii, ke ne estis tute simple peco da sukero?

Linda: Li ne agus tiel kasxe, se estus nur sukero.

Tom: Cetere, cxi tie ne estas peca sukero. Estas nur pulvora sukero, en sukerujoj.

Bob: Eble li havis sukerpecon en la posxo kaj...

Tom: CXu vi ofte promenas kun sukerpecoj en via posxo?

Bob: Vi pravas. Tiu ideo estas absurda. Tamen...

Linda: Rigardu! Jen sxi ekstaras, kaj ekiras for.

Bob: SXi sxajnas tute normala. Versxajne vi imagis ion draman, dum temas pri tute simpla, tute natura okazajxo.

DEMANDOJ (5)

Kio estis en la mano de la blondulo antauxe?
(sukerpeco / la taso de Gerda / io tre malgranda / la taso de Linda / nenio)

Kio estis en lia mano poste?
(sukerpeco / la taso de Gerda / io tre malgranda / la taso de Linda / nenio)

Kio estas en la sukerujoj tie?

(sukerpecoj / pulvora sukero / iu drogo / mistera substanco / sekreta lingvo)

CXu estas normale promeni kun sukerpecoj en la posxo?

(jes / ne)

Kiu ekiras for?

(Linda / Gerda / Tom / Bob / la blondulo)

EKZERCOJ (5)

Ekzemplo:

[Kiam / Se] li estus studento, mi lin konus.

---> Se li estus studento, mi lin konus.

Por vi:

Mi ne scias, [kiam / se] sxi venos al ni.

Mi tre multe laborus, [kiam / se] mi povus.

[Kiam / Se] li estas studento, li estas en la universitato.

[Kiam / Se] Tom estis juna, Gerda jam lernis kriptografion.

Mi volas paroli ankaux pri vi, [kiam / se] vi permesas.

Mi parolis kun sxi, [kiam / se] sxi sidis en la restoracio.

CXAPITRO 6 (SES)

Tom: CXu vi auxdis? Kio estis tio?

Bob: Jes, mi auxdis. Mi auxdis ion.

Linda: Ankaux mi auxdis strangan bruon, kvazaux iu falus en la koridoro.

Bob: Kvazaux _sxi_ falus.

Tom: Mi havis la saman penson kiel vi. Ankaux mi pensis tion. Ankaux mi pensis: jen Gerda falas en la koridoro.

Linda: CXu ni iru vidi?

Tom: Kompreneble. Ni iru tuj.

Bob: Mi iru kun Tom, sed vi restu cxi tie, Linda. Observu tiun junulon, kun kiu Gerda parolis, kaj kiu eble metis drogon en sxian kafon.

Linda: CXu vi ambaux foriras kaj mi restu tute sola? Mi iom timas.

Bob: Ni ne havas la tempon diskuti. Ni devas iri vidi tuj. Restu trankvile cxi tie. Vi nenion riskas. Venu, Tom, ni ne perdu tempon.

DEMANDOJ (6)

Kion Tom, Bob kaj Linda auxdis?
(koridoron / strangan bruon / penson / la blondulon)

Kiu eble falis en la koridoro?
(Tom / Bob / Linda / Gerda / la blondulo / Ronga)

Kiuj iras vidi?
(Linda kaj Tom / Linda kaj Bob / Bob kaj Tom / cxiuj tri)

Kiu restas por observi?
(Tom / Bob / Linda / la blondulo / Gerda)

EKZERCOJ (6)

Ekzemplo:

[Li / Lin] metas [gxi / gxin] en la [posxo / posxon].

---> Li metas gxin en la posxon.

Nun decidu vi:

La [blondulo / blondulon] metis [sukero / sukeron] en la [taso / tason] de [kafo / kafon].

[Li / Lin] volis iri en la [restoracio / restoracion], al la [bela / belan] [knabino / knabinon], sed [li / lin] falas en la [koridoro / koridoron].

Bob konsentas kun [Linda / Lindan].

[Ili / Ilin] rigardas al la [studentoj / studentojn].

[Iu / Iun] perdis [ajxo / ajxon] en la [restoracio / restoracion].

Ili metas [gxi / gxin] sur la [tablo / tablon] kaj decidas promeni al la [universitato / universitaton]. [Ili / Ilin] ekiras.

CXAPITRO 7 (SEP)

(En la koridoro)

Tom: Jen sxi estas. Ni pravis. SXi apenaux havis la tempon alveni gxis la angulo, jam sxi falis. Videble, sxi estas nekonscia. SXi perdis la konscion kaj falis.

Bob: CXu sxi ankoraux vivas?

Tom: Jes. Ne timu. SXi perdis la konscion, sed sxi ne perdis la vivon. La koro batas. GXi batas malforte, sed tamen batas. SXi do vivas. Eble sxi apenaux vivas, sed sxi vivas.

Bob: Kion ni faru?

Tom: Kion vi opinias?

Bob: SXajnas, ke sxi dormas.

Tom: Ni devas informi la auxtoritatojn. Tuj. Mi iros. Ili eble decidus voki doktoron, kuraciston, kaj almenaux tuj sendos flegistinon. Certe estas flegistino en cxi tiu universitato, cxu ne?

Bob: Versxajne, sed mi ne scias certe. Mi estas cxi tie apenaux unu semajnon.

Tom: Nu, mi tuj iros informi ilin. Restu cxi tie kun sxi. Sed ni unue metu sxin pli bone, ke sxi kusxu komforte, kun la piedoj pli altaj ol la kapo.

Bob: CXu vere? CXu vere vi volas, ke sxi kusxu kun la piedoj pli altaj ol la kapo? Tio ne estas komforta.

Tom: Tamen, kiam iu perdis la konscion, tio estas la gxusta pozicio, se mi bone memoras, kion oni instruis al mi.

DEMANDOJ (7)

CXu Gerda ankoraux vivas?
(jes / ne)

Kiel batas la koro de Gerda?
(forte / malforte / nekonscie / konscie / versxajne)

Kiun Tom volas informi?
(la blondulon / la profesoron pri lingvistiko / la auxtoritatojn / spionon)

CXu iu, kiu perdis la konscion, kusxu kun la kapo pli alta ol la piedoj?
(jes / ne)

EKZERCOJ (7)

Ekzemplo:

[Mi / Min] restis tie unu [semajno / semajnon].

---> Mi restis tie unu semajnon.

Nun faru vi:

La [sukerpeco / sukerpecon] falis en la [kafo / kafon].

Sed [mi / min] ne deziras [sukero / sukeron] en [mia / mian] [kafo / kafon].

Jen [Linda / Lindan] venas en la [restoracio / restoracion]!

Eble [sxi / sxin] deziras [kafo / kafon] kun [sukero / sukeron].

[Tiu / Tiun] [tago / tagon] [mi / min] laboris tre multe.

[Li / Lin] restis tie unu [tago / tagon]; [mi / min] restis dum [tuta / tutan] [semajno / semajnon].

Demandu, [kio / kion] [li / lin] faras! --- Ne! Demandu [vi / vin]!

La [kafo / kafon], [kiu / kiun] [vi / vin] havas, estas sen [sukero / sukeron].

La [kafo / kafon], [kiu / kiun] [vi / vin] metis sur la [tablo / tablon], [ili / ilin] ne trinkis.

La [viro / viron], [kiu / kiun] metis [kafo / kafon] sur la [tablo / tablon], ne estas [studento / studenton].

La [tablo / tablon], sur [kiu / kiun] estas la [kafo / kafon], estas tro [malgranda / malgrandan].

CXu [vi / vin] havas iom da [kafo / kafon]? --- [Mi / Min] havas tri [tasoj / tasojn] da [kafo / kafon].

Ekzemplo:

CXu Tom estas same alta [kiel / ol] Bob, aux cxu li estas pli alta [kiel / ol] Bob?

---> CXu Tom estas same alta kiel Bob, aux cxu li estas pli alta ol Bob?

Nun faru vi:

[Kiel / Ol] vi scias, Bob estas pli alta [kiel / ol] Tom, sed malpli alta [kiel / ol] la stranga blondulo.

Mi preferus resti cxi tie [kiel / ol] iri informi la auxtoritatojn.

La vero ofte sxajnas pli absurda [kiel / ol] imagajxoj.

Li igxis pli kaj pli forta; li igxis forta [kiel / ol] fortulo.

Iru pli rapide, aux iru malpli rapide; iru [kiel / ol] vi volas!

CXAPITRO 8 (OK)

En la universitata memserva restoracio, Linda sidas kaj pensas. SXi pensas ne tre trankvile. Fakte, sxiaj pensoj igxas pli kaj pli maltrankvilaj.

SXi observas la junan viron, kiu metis ion en la kafon de Gerda.

SXi pli kaj pli maltrankviligxas.

Tom kaj Bob estas for jam longe. Ili ne revenas. CXu do vere okazis io al Gerda? Sed kio okazis? CXu io grava?

Linda observas la junulon kaj pensas:

"Kion mi faros, se li ekstaros kaj foriros?"

"CXu mi sekvos lin? CXu mi sekvu lin?"

"Kion mi faru, se li iros eksteren? CXu mi sekvu lin eksteren? CXu mi sekvu lin ekstere? Mi ne scias, kion mi faru. Mi ne scias, kion mi faros. Mi ne scias, cxu mi sekvos lin aux ne.

"Kaj se li foriros en auxto? CXu ankaux mi sekvu lin auxte?"

"Jam estas vespero. Baldaux venos nokto. Jes. Baldaux noktigxos. CXu mi sekvu lin nokte?"

"Kaj ecx se li ne iros eksteren de la universitato, ecx se li restos cxi tie, cxu mi sekvu lin?"

"Se li eliros tra tiu cxi pordo, li iros en la koridoron al iu cxambro. CXu mi sekvu lin en la koridoron? CXu mi sekvu lin en la koridoro? CXu mi sekvu lin en la cxambron, en kiun li eniros? Ne. Neeble. Mi atentos en la koridoro. Sed se nenio okazos? Se li restos longe plu en la cxambro?"

"Kaj se li eliros tra tiu pordo, li iros eksteren, versxajne al la urbo. CXu mi sekvu lin al la urbo? CXu mi sekvu lin en la urbon? CXu mi sekvu lin en la urbo?"

"Se li iros piede, eble li vidos min, versxajne li vidos min. Li suspektos, ke mi lin sekvas. Li turnos sin al mi. Mi ektimos. Mi paligxos kaj tuj poste rugxigxos. CXiaokaze, mi maltrankviligxos. Jam nun mi maltrankviligxas.

"Se li iros per buso, li ecx pli certe vidos, ke mi sekvas lin, cxar ni devos kune atendi cxe la haltejo."

Linda ne sukcesas decidi, kion sxi faru.

SXi timas. SXia koro batas rapide. SXi volus, ke Tom kaj Bob estu kun sxi, ke ili helpu sxin, ke ili helpu sxin decidi. SXi estas tute sola. SXi sentas, ke sxia koro rapidigxas, sed sxi ne scias, kion fari.

Kaj jen, antaux ol sxi povis decidi, antaux ol sxi sukcesis retrankviligxi, jen la juna viro ekstaras. Li rigardas al la koridora pordo. CXu tien li iros? Li rigardas al la pordo, tra kiu oni eliras al la urbo. CXu tien? Jes, tien li iras.

Kaj Linda auxtomate ekstaras kaj ekpasxas al la sama pordo. Ne sxi decidis. SXajnas, ke sxia korpo decidis mem. SXajnas, ke sxiaj

kruroj agas mem. Nu, cxiaokaze, jen Linda sekvas lin. Al kiu mistera destino?

DEMANDOJ (8)

CXu Linda estas trankvila?
(jes / ne)

CXu Tom kaj Bob jam revenis?
(jes / ne)

CXu Linda scias, kio okazis al Gerda?
(jes / ne)

Kiu ekstaras kaj iras al la pordo?
(Linda / Gerda / la juna viro, kiu metis ion en la kafon de Gerda / Bob / Tom)

Kiu sekvas?
(Linda / Gerda / la juna viro, kiu metis ion en la kafon de Gerda / Bob / Tom)

EKZERCOJ (8)

("Berlino", "Londono" kaj "Parizo" estas urbo-nomoj.)

[Oni / Onin] sendis [mi / min] al [Berlino / Berlinon] por paroli kun la [spiono / spionon].

En [Berlino / Berlinon] mi atendis kvar [tagoj / tagojn] sed ne vidis [li / lin].

La [tuta / tutan] [tempo / tempon] ili observis la [virino / virinon] en [Londono / Londonon].

Ili sekvis [sxi / sxin] al [Parizo / Parizon], sed en [tiu / tiun] [urbo / urbon] [ili / ilin] perdis [sxi / sxin].

Kiam [oni / onin] auxdis [tiu / tiun] [novajxo / novajxon] el [Parizo / Parizon], [oni / onin] decidis, ke [mi / min] ne plu restu en la [urbo / urbon].

Ekzemplo:

Vi parolu pri [vi / si].

---> Vi parolu pri vi.

Nun faru vi:

Mi konas [min / sin]. Mi do ne volas vidi [min / sin] en la spegulo. Tom estas pli bela ol mi, kaj mi ofte vidas lin rigardi [lin / sin] en la spegulo. Kiam li turnas [lin / sin] al mi, mi plene vidas [sian / lian] belan aspekton.

CXu vi volas piediri reen al [via / sia] cxambro? Vi promenos longe, sed ne timu, ke [viaj / siaj] kruroj tro laboros kaj perdos [ilian / sian] tutan forton.

Ekzemplo:

Mi konas [mi* / si*] vizagxon.

---> Mi konas mian vizagxon.

Atente rigardu la tutan ekzercon unue!

CXu vi havas informojn pri Linda? SXi kusxis en [sxi* / si*] cxambro kaj ne sentis [sxi* / si*] tre bone. Tom iris al [sxi* / si*] kun [li* / si*] kuracisto, sed sxi ne rigardis tiun kuraciston serioza. SXi preferis [sxi* / si*] kuraciston; sxi vere ne amas [li* / si*]. Li do forsendis [li* / si*] kaj vokis [sxi* / si*]. Strange, kiam sxi vidis [li* / si*] kuraciston, sxi sentis [sxi* / si*] malbone, sed tuj kiam sxi vidis [sxi* / si*] kuraciston alveni, sxi jam sentis [sxi* / si*] pli bone. Oni [oni* / si*] demandas, cxu sxi ametas [li* / sxi* / si*] kuraciston.

CXAPITRO 9 (NAUX)

"SXi kuxsas meze de la koridoro! Venu, venu tuj. Certe la afero urgxas," diras Tom.

Li rigardas la flegistinon: sxi estas dika, grasa virino kun bluaj okuloj, rugxaj haroj, kaj tre ronda vizagxo. Jam kelkajn minutojn li provas diri, kio okazis, sed sxajnas, ke tiu flegistino ne rapide komprenas. La vorto "urgxa" sxajnas ne ekzisti en sxia vortaro.

"Kuxsas, cxu? Meze de la koridoro, cxu vere?" sxi diras.

Videble, la flegistino apenaux povas kredi.

"Kial, diable, sxi kuxsus meze de la koridoro?" sxi demandas.

"Mi petas, venu urgxe. Mi ne scias, kial sxi kuxsas tie. Mi nur diras, kion mi vidis. Ni trovis sxin tie. Eble sxi estis malsana. Mi ne scias. SXi svenis, sxi perdis la konscion. Nun certe oni devas urgxe okupigxi pri sxi."

"Stranga afero!"

"Nu, mi ne estas fakulo. Vi jes. Okupigxi pri malsanaj homoj estas via fako, cxu ne? Venu tuj. Urgxas!"

"Nu, nu, nu, nu. Kial, diable, sxi svenis en la koridoro? Stranga ideo! Oni neniam svenas tie."

"CXu vere? Kie do oni svenas en cxi tiu universitato? Pardonu min, sed mi ne konas la tradiciojn. Mi estas novulo. Apenaux unu semajnon mi estas cxi tie."

"Juna viro, en cxi tiu universitato, oni svenas en la klascxambroj, oni svenas en la restoracio, oni svenas en la dorm-cxambroj, oni svenas en la bancxambroj, eble ecx oni povus sveni en iu administra oficejo. Sed pri sveno koridora mi neniam auxdis. Stranga epoko! Stranga generacio! Oni faras ion ajn niaepoke."

"Vi parolas, parolas, paroladas, kaj dume tiu kompatinda knabino kuxsas en koridoro, kaj neniu zorgas pri sxi!"

"Nu, nu, ne maltrankviligxu, juna viro, ne havu zorgojn. Ni tuj rapidos tien, kaj mi tuj prizorgos sxin."

Kaj ili kune rapidas al la loko, kie Tom lasis sian amikon kun Gerda.

Sed jen subite Tom haltas.

"Kio okazas? Kial vi ekhaltis?" demandas la flegistino.

"SXi estis cxi tie, kaj ne plu estas, sed..."

"Sed estas iu alia, kaj _li_ estas senkonscia, sxajnas al mi. CXu vi konas lin?"

"Jes, estas mia amiko Bob. Kio okazis al li?"

La flegistino iras al Bob, kiu falsidas cxe la koridora muro. SXi tuxsas lian kapon.

"Batita! Oni batis la kapon al li!"

"Diable! Bob, Bob! Respondu! CXu vi auxdas min? Diru ion, mi petas! Kio okazis?"

Sed Bob ne respondas, kaj Tom igxas pli kaj pli maltrankvila.

DEMANDOJ (9)

CXu la flegistino venas tuj?

(jes / ne)

CXu oni ofte svenas en koridoro?

(jes / ne)

Kial Tom ekhaltas?

(Li estas novulo. / Gerda ne plu estas tie. / Okupigxi pri malsanuloj ne estas lia fako.)

Kiu sidas cxe la muro?

(Tom / Bob / linda / Gerda / la flegistino)

CXu Bob paroladas?

(jes / ne)

EKZERCO (9)

Pri demandovortoj. Ekzemplo:

___ vi iras? - Mi iras al la urbo.

---> Kien vi iras? - Mi iras al la urbo.

La demandovortoj jam lernitaj estas:

kio, kion, kiu, kiun, kiel, kiam, kial, kie, kien, cxu.

Jen por vi:

___ diris la kuracisto? - Li diris, ke mi estu senzorga, ke mia malsano ne estas tro serioza.

___ vi resanigxos? - Baldaux. Eble post kelkaj tagoj.

___ vi iros unue post la resanigxo? - Unue mi iros en bonan restoracion.

___ vi iros sola? - Ne, amikoj iros kun mi.

___ helpas vin dum la malsano? - Mia amiko Petro.

___ estas via patrino? - En sia oficejo; sxi devas multe labori tie.

___ vi ne povas iri piede? - CXar miaj kruroj estas tute senfortaj.

___ vi ekmalsanis? - Mi ekmalsanis tre subite.

___ tio okazis? - En mia laborejo.

___ ili metis en vian laborlokon? - Neniun, do la laboro restas nefarita kaj atendas min.

___ ili metis neniun en vian lokon? - CXar laboristo por mia laboro estas malofte trovebla.

CXAPITRO 10 (DEK)

Fakte, Tom ne estas ema fidi la flegistinon. Kial? CXu vi scias, kara amiko, vi kiu sekvas cxi tiun aventuron ekde la unua vorto? CXu vi scias, kial Tom ne emas fidi la flegistinon?

Ne. Certe vi ne scias. Ankaux mi ne scias. Sed fakto restas fakto, ecx se ni ne komprenas gxin. Kaj la fakto estas, ke Tom ne emas sxin kredi.

Tom estas agema knabo, ecx iom aventurema, kaj eble tiu tro parolema flegistino ne sxajnas al li kredinda. Eble li opinias, ke tiu flegistino tro emas paroli, kaj do ne estas fidinda. Aux cxu temas pri io alia?

Tom ege sxatas sian amikon Bob. Li sxategas lin. Li lin amas, fakte. Bob kaj li amikigxis antauxlonge en la urbego, kie ili vivis tiutempe -- ili dumtempe ecx iradis al la sama lernejo -- sed poste Tom devis iri al malsama urbo, kaj ili ne plu vidis sin reciproke. Kiam, antaux kelkaj tagoj, ili retrovis unu la alian en la sama universitato, ambaux ege dankis la destinon.

Ili treege sxatas la tiean bonegan vivon. Ili sxategas gxin. Ambaux estas agemaj, laboremaj knaboj, kun speciala sxato al la iom timemaj studentinoj. Eble cxar timema junulino estas malpli timinda ol ino neniam ema timi, ol sen-tim-ulino. CXu vi komprenas?

Sed nun Tom malsxatas la aventuron. Li sin demandas, kial li sentas tiun flegistinon nefidinda. Li preferus silenteman, grav-aspektan sinjorinon. Tiu cxi ne aspektas tre zorgeme, kaj li ne trovas sxin atentema pri liaj demandoj. Verdire, li opinias sxin ema fusxi sian laboron. Li timas, ke sxi ofte agas fusxe. Fusxemaj homoj ekzistas en la mondo. Kial tiu tro parolema flegistino ne estus unu el ili? CXu li mispasxis, kiam li turnis sin al sxi? Sed al kiu alia li povus sin turni? SXi estis la sola flegistino, kiu trovigxis en la universitato. Aux cxu li mispensas?

Kaj nun li sentas sin ema zorgi pri Linda. CXu tiu belega knabino ne trovigxas en dangxero? Li amas sxin, li ecx amegas sxin, pli kaj pli, kaj la ideo, ke dangxeraj homoj povus fari ion al sxi, apenaux estas travivebla. La vivo ne estas facila, kaj sxajnas nun, ke la tuta afero igxas pli kaj pli malsxatinda.

DEMANDOJ (10)

Kiu ne emas fidi la flegistinon?

(Tom / Bob / Linda / Gerda / la blondulo)

Kie Tom kaj Bob retrovis sin reciproke?

(en lernejo / en universitato / en la urbego, kie ili vivis tiutempe)

Estas ___ flegistino(j) en la universitato.

(unu / du / tri / kvar / kvin)

Pri kiu zorgas Tom?

(pri Bob / pri Gerda / pri Linda / pri la flegistino)

CXu Tom sxatas la novan aventuron?

(jes / ne)

Kiun amas Tom?

(Gerdan / Lindan / Rongan / la flegistinon)

EKZERCOJ (10)

Ekzemplo:

Tom [*] Linda estas student[*].

---> Tom kaj Linda estas studentoj.

Nun faru vi:

Tom [*] Linda estas student[*]. En universitat[*] restoraci[*] ili observas blond[*] junul[*], kiu agas plej strange: Dum li parolas [*] knabino, li kasx[*] metas io[*] en sxi[*] kafotaso[*].

Eble estis drogo, cxar tuj post ki[*] sxi ekstaras kaj forlasas la restoracio[*], [*] la koridoro[*] sxi jam perdas la konscion. Intertemp[*], Bob sid[*]is cxe Tom kaj Linda.

Li povas rakont[*] al ili[*], ki[*] estas la knabino: SXi estas Gerda, nova instruist[*] pri kriptajxoscienco ([*]novaj sekretaj lingvoj). Ronga, la profesoro pri lingvistiko, volis, ke sxi ven[*] al la universitato [*] instru[*] kaj labor[*] kun li.

Kiam ili auxdas sxi[*] falbruon el la koridor[*], Bob kaj Tom rapidas por helpi sxi[*]. Bob metas sxin bone, tiel [*] sxi kusxu komforte, kaj Tom ir[*] vok[*] flegistinon.

Tiu flegistino, dika, grasa kaj parolema, nur post long[*] diskut[*] kun Tom konsciigxas [*] tio, ke la afero urgxas. Se sxi est[*] pli zorgema, sxi [*] rapidus kaj eble ne okazus jeno:

Kiam Tom fine [*]venas kun la flegistino, Gerda estas for, kaj Bob sidas cxe la koridor[*] mur[*], bat[*]a surkape. Kion [*]tempe faras Linda? SXi pli kaj pli [*]trankvil[*]as, lasite sola [*] la universitata restoracio kun la blond[*] strang[*].

SXi observ[*] lin, kaj kiam li eliras tra la pordo alurb[*], sxi[*] sekvas li[*]. Linda estas junulino iom tim[*], certe belega. Tom am[*]as sxin; li havas okulojn nur [*] sxi.

Li zorgas pri sxi. CXu sxi trov[*] en dangxero? Ki[*], fakte, sxi iros? Kaj Gerda, kien sxi[*] forigxis? Ki[*] okaz[*] kun sxi? La afero [*] pli kaj pli mistera!

CXAPITRO 11 (DEK UNU)

Linda ekhavis ideon. Sxi aliris la junan blondan viron, dum li proksimigxis al sia auxto, kaj alparolis lin:

"Sinjoro, cxu vi bonvolus helpi al mi?"

Li turnis sin al sxi kun vizagxo sxajne ne tre kontenta, kaj sxin rigardis dum longa senvorta minuto.

"Kiel mi povus vin helpi?" li fine demandis, kaj li tuj aldonis: "Bonvolu pardoni min, se mi respondas nee, sed al mi tempo vere mankas. Mi devas urge veturi al la urbo."

"GXuste tiel vi povas min helpi. Mia auxto paneas. Io estas fuxita en gxi. Mi ne sukcesas gxin irigi..."

"Pardonu min, sed mi ne sukcesus rebonigi la aferon, ecx kun plej granda bonvolo. Pri mekaniko mi scias nenion. Mi cxiam miras vidi, ke veturiloj entute funkcias. Kiam mi vidas motoron, cxiam mirigas min, ke tia sxajne senorda arangxo de pecoj kaj objektoj igas auxton iri. Mi..."

"Mi ne petas vin ripari mian veturilon, vi min miskomprenis. Mi demandas nur, cxu vi bonvolus akcepti min en via auxto gxis la urbo."

La ideo de Linda estis jena: sekvi lin estus dangxere, sed se li veturos auxte, mi petos lin akcepti, ke mi veturu kun li, kaj dum la veturado mi igos lin paroli. Mi diskrete faros sxajne banalajn demandojn, kaj paroligos lin. Tiel mi scios kiel eble plej multe pri li.

"Nu, bone," li fine konsentas. "Konsentite, venu." Kaj li malfermas la pordon de la auxto por sxi.

"Dankon, vi vere estas tre afabla. Tio ege helpas min. Mi plej sincere dankas."

"Ne dankinde," li respondas, iom seke. Kaj li ekirigas la motoron.

"Mi ne sxatas la ideon, ke mi devos venigi ripariston, mekanikiston," sxi diras. "Mi tute ne sxatas auxtojn, fakte. Mi havas veturilon, cxar estas tre oportune, sed mi ne sxatas auxtojn."

La alta junulo nur silentas.

"Ne estas facile igi lin diri ion," pensas Linda, iom zorge, sin demandante, cxu estis sagxe enmiksi sin en tiun aventuron. Sxi forte deziras lin paroligi, sed samtempe timas malkontentigi lin. Neniam estas facile trovi plene kontentigan manieron agi.

"CXu gxenas vin, se mi parolas?" sxi demandas, "vi eble estas silentema."

"Mi havas zorgojn," li respondas.

"Mi ne volas gxeni vin. Estas jam tiel bonkore, ke vi min veturigas. Mi vere sentas grandegan dankemon al vi."

"Ne dankinde," li ripetas, kaj silentas plu, pripensema.

DEMANDOJ (11)

De kiu Linda petas helpo?

CXu la juna blonda viro estas kontenta?

Kien la blondulo volas veturi?

Kion volas Linda de li?

CXu la blondulo konsentas?

Pri kio Linda parolas dum la veturo?

CXu la blondulo estas parolema?

EKZERCOJ (11)

Ekzemplo:

Tio facil[igx / ig]as la laboron. La laboro facil[igx / ig]as.

---> Tio faciligas la laboron. La laboro faciligxas.

Faru vi:

Mi volis aspekti pli bele ol normale. Mi [igx / ig]is min pli bela antaux la promenado. Antaux la promenado, mi [igx / ig]is pli bela. Penjo ridis pri mi, cxar mi plibel[igx / ig]is min. Ni veturis en la urbon. Vetur[igx / ig]is nin Penjo. SXi [igx / ig]is mia amiko tuj post mia unua tago en la laborejo. Antaux la forveturo, sxi trovis min en mia cxambro, kie mi plibel[igx / ig]is.

La urbo trov[igx / ig]as tro malproksime de nia laborejo por iri piede. Penjo ne havas auxton, sed sxi sukcesis hav[igx / ig]i al si la auxton de Bob.

Post longa promenado en la urbo, ni volis eksidi en trinkejo. Tuj post kiam ni sid[igx / ig]is cxe tablo, iu ulo turnis sin. Li turn[igx / ig]is al ni kaj ekrigardis nin. Ni eksentis nin malbonaj. Lia rigardado malbonsent[igx / ig]is nin. Ni devis agi. Ni ne plu restis sidaj, ni restar[igx / ig]is, tiel dev[igx / ig]ante lin forturni sin. Li komprenis, ke li gxenis nin ade rigardante al ni. Ni kompren[igx / ig]is al li, ke rigardado povas esti maldiskreta.

Mi lernas multon en la urbo. GXi lern[igx / ig]as min pri la vivo. Multhoma kunvivado lern[igx / ig]as kvazaux auxtomate en la urbo.

CXAPITRO 12 (DEK DU)

Bob duone malfermas la okulojn, ilin refermas, ilin malfermetas denove, ilin refermas, gxemas, kaj finfine malfermas ilin tute largxe.

"Donu al mi ion por trinki," li diras.

"Trinki? Kion vi deziras trinki?" demandas Tom.

"Ion ajn. Brandon. Donu al mi glason da brando."

"Kiel vi sentas vin?" diras frauxlino Marta, la flegistino.

"La kapo doloras," Bob respondas gxeme. "Mi petas vin, bonvolu doni al mi ion por trinki."

"CXu vi bonvolas iri," Tom petas la flegistinon, "kaj alporti al li glason da brando?"

La flegistino iom hezitas, sed fine kapjesas.

"CXu mi ankaux voku la policon?" sxi diras. "Li ja ricevis baton, baton suficxe fortan, por ke li igxu senkonscia. Laux mia opinio, tio pravigas, ke oni venigu la policon. CXu vi ne konsentas?"

"Ankaux akvon," diras Bob, antaux ol Tom trovas la tempon respondi al Marta. "Mi tre soifas. Mi trinkos brandon plezure, sed unue mi trinku akvon. Bonvolu alporti al mi tre grandan glason da akvo kaj iom grandan glason da brando."

"Jes. Estus sagxe voki la policon," Tom respondas al la flegistino.

"Se vi ne alportos al mi ion por trinki, mi iros mem," diras Bob. "Mi tre soifas. Vi ne povas imagi, kiom soifa mi min sentas. Mi tuj iros trinki akvon. Kaj poste mi iros acxeti brandon. CXu oni povas ricevi brandon en la memserva restoracio?"

"Ne, tute ne," Marta respondas, "sed mi havas brandon en mia cxambro. Mi alportos gxin al vi. Aux venu mem, se vi povas. CXu vi povas starigxi?"

"Mi povas," diras Bob, tre malrapide starigxante kun la helpo de Tom kaj de la flegistino, "kvankam dolore."

Ili iras al sxia cxambro.

"Trinku tiom da akvo, kiom vi deziras," sxi diras. "Kaj poste mi donos brandon al vi. Eksidu sur tiun segxon, gxi estas tre komforta, vi vidos."

Bob sidigxas sur la segxon, iom gxemas, kaj ricevas grandan glason da akvo kun videble grandega plezuro. "Doloras al mi la kapo," li diras.

"Diru," petas Tom, "kio okazis. CXu finfine vi klarigos al ni? Ni estas ege scivolaj."

Bob pripensas iomete, trinkas iom da akvo, metas la manon al la kapo kun dolora esprimo survizagxe, kaj fine respondas:

"Mi ne povus klarigi. Nenio estas klara. Mi estis tie apud Gerda. Mi auxdis nenion, mi auxdis neniun bruon. Kaj subite cxio eksplodis en mia kapo kaj mi mortis."

DEMANDOJ (12)

Kion Bob tuj deziras?

Kie oni povas trovi brandon?

Kion Bob trinkas unue?

CXu li povas bone klarigi, kio okazis?

CXu li auxdis bruon?

CXu Bob vere mortis?

EKZERCOJ (12)

Forigu la vortojn kun "{}"!

Ekzemploj:

Marko sxatas {la} auxton {de Marko}.

---> Marko sxatas sian auxton.

{Petro} sxatas {la} auxton {de Ivano}.

---> Li sxatas lian auxton.

Por vi:

{Linda} rigardas al {Linda} en la spegulo.

{Tom} rigardas al {la blondulo}.

{Tom} rigardas al {la} kunulo {de Tom}.

{Tom} rigardas al {la} kunulo {de la blondulo}.

{La} amiko {de Bob} amas {Lindan}.

{La} amikino {de Tom} rigardas {la amikino de Tom} en la spegulo.

{La} amikino {de Ivano} amas {Ivanon}.

{La blondulo} estas en {la} auxto {de la blondulo}.

Gerda estas en la auxto de {la} amiko {de Gerda}.

{Petro kaj Ivano} kasxas {Petron kaj Ivanon} sub la tablo.

CXAPITRO 13 (DEK TRI)

La vojo sxajnas longa, kiam oni silentas la tutan tempon. Linda estas parolema; krome, sxi deziras ricevi informojn pri sia stranga kunulo; sxi do tute ne sxatas tiun longan silentadon. Kial ne provi denove? SXi decidis, ke sxi rekomencos paroli. Se li ne sxatos, nu, li esprimos sian malsxaton, kaj ili plu veturos senvorte, kaj la vojo plu sxajnos longega.

"Vi diris...", sxi komencas, ne sciante, kiel sxi finos, sed felicxe ideo tuj venas: "Vi diris, ke vi havas zorgojn. Nu, ofte oni sentas sin pli bone, kiam oni esprimas siajn zorgojn al iu."

"Vi estas scivolema, cxu ne? Nu, mi ne volas esti malafabla kun tiel bela knabino, kiel vi. Pardonu, se mi ne montras min pli amikigxema. Sed miajn zorgojn mi ne povas klarigi."

"CXu vi estas certa? Oni ofte imagas, ke afero estas neebla, cxar oni ne scias, kiel komenci, sed..."

"Ne. Kiom koncernas min, ne estas tiel. Mi ne povas rakonti pri miaj zorgoj, cxar ili koncernas personojn, pri kiuj mi ne rajtas paroli. Oni devas esti diskreta, cxu ne? CXu vi sxatus, ke viaj amikoj rakontu cxion pri vi al nekonato?"

"Kompreneble ne. Mi bone komprenas vin. Fakte, mi ne estas speciale scivola. Mi komencis diri tion nur, cxar mi trovis la silenton peza kaj la vojon pli kaj pli longa. Sed mi tute ne volus maldiskreti."

"Estas fakto, ke oni kutime interparolas, kiam oni veturas kune. Mi versxajne ne estis tre gxentila, lasante tiun silenton dauxri kaj dauxri pli kaj pli peze por vi. Mi ecx ne rimarkis, ke silento estigxas kaj dauxras. Mi estis absorbita de miaj pensoj, de miaj zorgoj, kaj ankaux de la vojo. Oni devas atenti la vojon, kiam oni sxoforas, cxu ne? Strange, kvankam vi estas tre bela kaj sidas tuj apud mi, plej proksime al mi, mi tamen forgesis pri vi. Nur ekzistis por mi la vojo en miaj okuloj, kaj la zorgoj en mia kapo."

"CXe mi okazis la malo. Mi dauxre pensis pri vi. Mi rimarkis, ke vi ne aspektas tre gxoje. Vi sxajnis malfelicxa. Mi min demandis, cxu mi povus helpi. Vi ja tre afable konsentis min veturigi. Mi sentas min danka. Mi volus redoni al vi similan servon. Mi opiniis, ke se mi helpas vin vortigi vian malgxojon, tio eble senpezigos vin, kaj mi estos kontenta agi helpe. Eble estas stulte, sed mi cxiam deziras felicxigi la homojn."

"Vere, vi estas tre bonkora. Mi ege bedauxras, ke mi ne povas jesi al via propono. Sed, kiel mi jam diris, miaj zorgoj koncernas aferojn, pri kiuj mi ne rajtas rakonti. Nu, jen ni alvenas. Kie vi deziras, ke mi lasu vin?"

"Kien precize vi iras? Kie vi haltos? Kie vi lasos la auxton? Vi povus lasi min tie. Estos plej facile por vi."

"CXiam scivola, cxu ne? Vi sxatus scii, kien mi iras," li diras ridante, dum Linda sentas sin rugxigxi, cxar similan rimarkon sxi tute ne atendis. Dum momento, sxi ne scias, kiel respondi. SXi sentas sin stulta.

"Tute ne," sxi fine diras, malvere. "Kien vi iras, tio tute ne interesas min. Mi proponis tion nur, cxar tio sxajnis plej facila. Sed se gxenas vin, ke mi scios, vi povas lasi min ie ajn en la centro. Ekzemple cxe la Internacia Hotelo, aux cxe la Granda Teatro. CXiaokaze, mi treege dankas vin kaj mi facile trovos mian vojon. Jen.

Tie cxi estas perfekte. Koran dankon, kaj gxis revido, kara sinjoro."

"GXis revido, kara spionino!"

La auxito forveturas, kaj Linda ne povas forturni la okulojn de gxi. Kara spionino, vere! Kion li volis diri? CXu li suspektus? Nia kompatinda Linda ne scias, kion pensi.

DEMANDOJ (13)

Kie sidas Linda?

Kial sxi volas paroli kun la blondulo?

CXu la blondulo volas klarigi siajn zorgojn?

Kiel Linda klarigas sian scivolon?

Kien precize veturas la blondulo?

Kie nun staras Linda?

Kion sxi timas vidante la forveturantan auxton?

EKZERCOJ (13)

Ekzemplo:

faradi :

---> faradi : agi

Trovu la vortojn!

antauxa parto de la kapo :

atentinda :

centro de supera instruado :

cxi tiam :

diri "bonan tagon" :

dudek kvar horoj :

eltrovisto de sekretoj :

en la tempo de :

faradi :

fina parto de brako :

havanta gxustan opinionon :

irigi laux la gxusta vojo :

juna vira homo :

kiun oni amas aux sxatas :

konsenti, ke iu faru ion :

lernanto cxe universitato :

malnormala :

ne konata, ne komprenata :

ne la sama :

ne ludema, grava :

nek kusxi, nek sidi, nek iel movigxi :

pala koloro de haroj :

peti informon :

pli sxati :

sciigi, ke oni volas ion ricevi :

sin movi piede :

sxajni lauxvide :

sxategi :

tie, kie muroj kuniras :
videbligi :

La vortoj estas:

agi, alia, ami, angulo, aspekti, blondo, demandi, direkti, dum, grava,
iri, kara, knabo, mano, mistera, montri, nun, permesi, peti, prava,
preferi, serioza, saluti, spiono, stari, stranga, studento, tago,
universitato, vizagxo

CXAPITRO 14 (DEK KVAR)

"Kie diable mi trovigxas?" diris al si Gerda, kiam sxi vekigxis. SXi kusxis sur lito -- sur malkomforta, tro mallargxa lito -- en cxambro nekonata, en domo nekonata.

Mankis al sxi forto, kaj sxia tuta korpo iom doloris; sxi estis laca, kvazaux sxi estus laborinta multajn horojn sinsekve en la kampoj, kvazaux sxi estus movinta pezajn rokojn kaj sxtonojn dum multaj kaj multaj tagoj, sen ecx horo da dormo, kvazaux sxi estus marsxinta dum multaj kaj multaj semajnoj sur malfacila monta vojeto. Unuvorte, sxi estis lacega, kaj sxajnis al sxi, ke cxiuj muskoloj de sxia korpo plendas pri troa laboro, nehome peza, nehome malfacila, nehome laciga.

Kaj tamen sxi sciis, ke sxi faris neniun korpan laboron; sxi sentis sin malgxoja; sxiaj okuloj malsekigxis; sxi ploris.

Ne estis multe da lumo en la cxambro. Kvankam sxi sentis sin tiel laca, tiel senforta, scivolo pri la situacio tamen superis sxian deziron plu kusxi. SXi sekigis siajn okulojn kaj ellitigxis. SXi iris al la eta fenestro, esperante malfermi la dikajn fenestrovilojn, kiuj malhelpis la envenon de lumo. SXi ankaux esperis, ke sxi vidos la sunon. Krome, estis tre varme en la cxambro, kaj estus sagxe malfermi la fenestron por enlasi iom da pura aero. Sed sxi ne sukcesis. Io malhelpis, ke tiu malnova fenestro movigxu.

SXi iris al la pordo; gxi estis sxlosita, kaj sxlosilo nenie videblis.

La cxambro estis malbela, ne tre pura. Apud la muro staris tablo kaj segxo. SXi sidigxis sur la segxon, metis la brakojn sur la tablon, la kapon en la manojn, kaj ploris. "Ensxlosita mi estas," sxi pensis. "Oni ensxlosis min!"

Antauxe sxi ne multe pensis pri la plezuro esti libera. Liberi estis io perfekte natura: sxi iris, kien sxi deziris, sen iu ajn malhelpo, kaj tiu libereco sxajnis rajto evidenta. Kaj nun oni malliberigis sxin malantaux sxlosita pordo. SXi, kiu tiom sxatis gxoji, ridi, kanti, kiu tiom sxatis ludi kaj promeni sub la suno, nun ne plu trovis en si la humuron, kiu tiom ofte helpis sxin en la malfacilaj horoj de la vivo. SXi ne povis vidi la eksteran sunon, kaj same en sxia koro ne plu lumis la kutima suno de gxoyo.

Kaj jen subite sxi reagis: sxi iris al la pordo kaj gxin batis kun plej granda forto; sxi faris timigan bruon, sed nenio okazis. SXi vokis pli kaj pli lauxte, kriis, kriegis, samtempe piedbatante la pordon, sed venis neniun respondo, neniun reago. Senespera, sxi revenis al la lito kaj rekusxigxis, pli laca ol iam ajn. Dum multaj horoj sxi restis tiel, kusxe, kaj fine, tro laca, sxi ekdormis.

Vekis sxin infana vocxo; gxi venis el iu alia cxambro, en la sama domo, tute certe; gxi diris: "Neniam diru nek al via patro nek al via patrino, ke ni venis en la forlasitan domon. Estas malpermesite ludi cxi tie. Se ili sciis..." Alia vocxeto respondis: "Mi neniam diros. Nek al mia patro, nek al mia patrino. Ne havu zorgojn. Neniam oni scios, ke ni venis ludi cxi tie."

Gerda diris: "Infanoj, cxu vi auxdas min?" SXia koro batis espere.

"Iu parolis," sonis unu el la infanvocxo, sed auxdeble la knabo ne parolis al Gerda, nur al sia kunulo. "CXu vi auxdis?"

"Estis kvazaux vocxo de virino," diris la alia.

"Infanoj, venu, helpu min, mi estas mallibera, oni sxlosis la pordon, mi estas ensxlosita, venu, mi petas, mi petegas, liberigu min," Gerda plu petegis. Sed la reago de la infanoj estis plej senkuragxiga.

"Venu!" kriis unu. "Estas fantomo!"

"Vi pravas," la dua respondis, "oni cxiam rakontis pri fantomo en cxi tiu forlasita domo. Fantomino, oni diris, kaj la vocxo estis ina. Ni rapide forkuru!"

"Mi timas," ankoraux diris la unua, dum la bruoj klarigis al Gerda, ke la du knaboj forkuras kaj lasas sxin sola, sola, sola...

DEMANDOJ (14)

CXu Gerda sciis, kie sxi estas?

Kiel aspektis la cxambro, en kiu Gerda kusxas?

Kial Gerda estis lacega?

CXu sxi sxatis sian malliberecon?

Kiel sxi provis liberigxi?

Kio vekis sxin?

Pri kio la infanoj parolis?

Kial la infanoj ne helpis sxin?

Kun kiu Gerda estis post la forkuro de la infanoj?

EKZERCOJ (14)

Ekzemplo:

parto :

---> parto : peco

Trovu la vortojn!

afero :

akiri scion :

aspekti :

diri reage al demando :

dormigilo :

en kiu tempo :

enhavanta cxion enhanceblan :

facile videbla, komprenebla :

fari por si ideon pri io :

havi ideon pri :

havi similan opinionon :

io el tre malgrandaj partetoj :

io, kio restu kasxita, ne konata :

iradi pro plezuro :

komunikajxo :

kontraux la normala sagxo :

lernigi :

malgranda :

malmontri :
malproksima :
parto :
pensajxo :
pli alta ol :
rapida, ne atendita :
rilatanta duo :
sciigi, konigi :
tio, pri kio io estas :
verajxo :
voli havi :
vorto, per kiu persono estas konata :

La vortoj estas:

absurda, ajxo, deziri, drogo, eta, evidenta, fakto, fora, ideo, imagi,
instrui, kasxi, kiam, komuniki, koni, konsenti, lerni, mesagxo, nomo,
paro, peco, plena, promeni, pulvoro, respondi, sekreto, subita, super,
sxajni, temo

CXAPITRO 15 (DEK KVIN)

"Bonan matenon, ho plej bela, cxu vi bone dormis?"

"Bonan matenon, Tom. Mi ne dormis tre multe. Kaj vi, cxu vi dormis kontentige?"

"Perfekte, kara, perfekte. Sed diru do al via plej fidinda amiko, kial vi ne sufcie dormis."

"CXu ne estas klare al vi? Mi tro pensis. Mi pensadis tutnokte pri cxio, kio okazis hieraux."

"Estas fakto, ke mi ne revidis vin hieraux, post kiam mi eliris kun Bob por okupigxi pri Gerda. Ni lasis vin en la memserva restoracio kun la tasko observi la blondulon. Kiam mi revenis, vi estis for. Kien vi iris? CXu vi faros al mi precizan raporton?"

"Kun plezuro, sed ankau vi raportos al mi poste, cxu ne? Nu, mi veturis al la urbocentro kun tiu junulo. Mi rakontis al li, ke io fusxa okazis al mia auxto, kaj mi petis lin min veturigi. Li hezitis, sed fine decidis jese. Mi deziris lin paroligi, por ekscii pri li kiel eble plej multe, sed mi ne sukcesis. Ni diris unu al la alia nur tre banalajn aferojn."

"CXu vi almenaux scias, kien li iris en la urbo, laux kiuj stratoj, al kiu domo?"

"Atendu. Mi rakontos cxion. Por ke mia peto sxajnu natura, mi petis lin lasi min en la centro. Li lasis min cxe la dekstra flanko de la Granda Teatro, kaj li veturis plu. Mi ne sciis, kion fari. Mi promenis en la urbo, pensante, ke mia ideo ne estis tiel bona: mi eksciis nenion pri li, kaj trovigxis sen auxto en la mezo de la urbo. Fakte, mi sentis min iom stulta. Mi promenis de strato al strato, provante elpensi planon, kaj jen subite mi vidas lin eliri el la posxtoficejo. Mi estis nekredeble bonsxanca. Imagu! Se mi estus trovigxinta naz-al-naze kun li gxuste kiam li eliris el la posxt-oficejo...! Sed mi vidis lin sufcie frue por min kasxi."

"Felicxe, ke vi vidis lin sufcie frue!"

"Kiel mi diris: mi estis bonsxanca, mi vidis lin gxustatempe. Nu, li iris piede, kaj mi decidis lin sekvi. CXu vi konas tiun grandan magazenon, kiu vendas kvardek malsamajn specojn de pano kaj cxiaspecajn cxokoladojn kaj aliajn dolcxajxojn? Sur la maldekstra flanko de la strato, kiu iras al la CXefa Sportocentro. Estas granda vendejo de mebloj apude. Nu, ne gravas, cxu vi konas aux ne. Li eniris tiun panejon, aux tiun dolcxajxvendejon, aux tiun... nu... tiun pan- kaj dolcxajxvendejon, kaj eliris post minuto portante paperan sakon, kiu aspektis plenplena. SXajnis, ke li acxetis la tutan magazenon. Mi devas diri, ke ili vendas tre bonajn ajxojn en tiu ejo. Mi, kiu tiom sxatas cxokoladon kaj dolcxajxojn, ofte irus tien kaj acxetus multon, se mi ne timus dikigxi. Nu...e... kion mi rakontis?"

"Vi raportis pri via spiona sekvado, sed vi devojigxis de la cxefa vojo de via raporto al flankaj konsideroj pri pano kaj cxokolado. Fakte, cxu vi deziras iom pli da pano? Kion vi trinkas cxi-matene? Teon, mi vidas. CXu vi sxatus, ke mi replenigu vian tason?"

"Jes, dankon. Mi plezure trinkos plian tason da teo. Dankon, Tom, kara. Nu, do..."

DEMANDOJ (15)

Kun kiu parolas Tom?

CXu sxi bone dormis?

CXu Tom raportas unue?

CXu sxi sukcesis paroligi la blondulon en la auxto?

Kie sxi poste vidis lin?

Kion la blondulo acxetis?

Kial Linda ofte irus al la vendejo por multon acxeti?

Kial sxi tamen ne faras tion?

Kion trinkis Linda?

EKZERCOJ (15)

Ekzemplo:

ne alia :

---> ne alia : sama

Trovu la vortojn!

al ekster :

atente rigardi :

cxuiuj el la du :

dangxero, necerteco :

dauxre esti en la sama loko :

ekmalhavi :

esti senkonscia, sed sana :

faciligi la agadon :

fina parto de kruro :

interparoli pri io :

io, kio funkcias per si mem :

iri malantaux io :

lauxte peti, ke iu venu :

malbela auxdajxo :

maltago :

motora veturilo :

ne alia :

ne en :

ne esti mortinta :

noktigxo :

parto de domo :

parto de la korpo, kie estas la okuloj :

pensanta :

post mallonga tempo :

resanigi :

doni sciigon :

sep tagoj :

tio, kion oni pensas pri iu temo :

tomatokolora :

zorgi pri malsanulo :

La vortoj estas:

ambaux, auxto, auxtomato, baldaux, bruo, cxambro, diskuti, dormi,

ekster, el, flegi, helpi, informi, kapo, konscia, kuraci, nokto,
observi, opinio, perdi, piedo, resti, risko, rugxa, sama, sekvi,
semajno, vespero, vivi, voki

CXAPITRO 16 (DEK SES)

"Kie mi estis en mia raporto? Ha jes! Mi memoras. Li eliris el tiu vendejo kun papera sako plena je dolcxajxoj."

"Eble estis cxefe pano."

"Prave, eble pano. CXiaokaze, jen mi ekvidis lian auxton, kiu staris flanke de la strato. Mi pensis: nun li forveturos auxte, kaj mi ne plu povos sekvi lin. Sed ne. Li nur iris porti tiun sakon al la auxto, gxin metis en gxin, resxlosis la auxtopordon, kaj plu piediris. Nur tiam mi havis la ideon noti la numeron de lia auxta numerplato. Mi do eksekvis lin plu. Li pasxis sur la dekstra flanko de la strato, kaj mi sekvis iom malproksime sur la maldekstra flanko."

"CXu li rimarkis, ke vi lin sekvas?"

"Certe ne. Subite, li eniris restoracion. Mi hezitis: cxu ankaux mi eniru? Aux cxu mi tro riskos, ke li vidos kaj rekonos min? Unufanke, mi deziris spioni lin. Aliflanke, la risko, ke li rekonos min, estis reala, kaj min gxenis. Dum mi staris tie hezitante, eniris la restoracion grupo da soldatoj, eble ok aux naux, junaj viroj, kiuj militservis, videble. Dum ili eniris kaj la pordo estis malfermita, mi vidis, ke la restoracio estas granda kaj plena je homoj. Mi sekvis la ok aux naux soldatojn kaj trovis sidlokon ne tre videblan de la loko, kie mia blondulo jxus eksidis."

"Li do estas _via_ blondulo, cxu?"

"Ne parolu malsagxe. Vi perfekte scias, kion mi volas diri. Estis turka aux pseuxdoturka restoracio, kun stranga muziko kaj strangaj vestajxoj. La kelneroj estis vestitaj per t.n. (=tiel nomataj) naciaj vestoj multkoloraj. Mi mangxis bonegan supon, sed poste ion, pri kio mi ankoraux nun min demandas, cxu estis pecoj el hundo aux kato. Certe ne estis kokidajxo, sed krom tio mi havas neniun certecon. Ankaux la salato estis tre bona, sed la kuko estis treege dolcxa, tro dolcxa por mi, kaj same la turka kafo; gxi estis nekredeble plena je sukero, kaj mi mangxis tiom da kafpulvoro, kiom mi trinkis da kafo."

"Mi miras pri la grava loko, kiun konsideroj pri mangxo kaj trinko okupas en via spionraporto. Mi atendis aventurojn, sed venas cxefe menuoj."

"Ne ridu pri mi, aux mi ne dauxrigos la rakonton. Okazis io. Du el la soldatoj estis furiozaj, cxar la kelnero ne volis porti al ili bieron. Ili faris bruegon, kriegis, kriacxis, la aliaj provis ilin silentigi, kaj finfine speco de milito komencigxis inter ili. Ili ekbatis unu la alian kun rimarkinda forto. Subite, jen unu telero flugis tra la aero, poste du, tri, kvar, kvin aliaj teleroj, unu taso ecx flugis gxis la plafono..."

"Kia gxojjo! Kia plezuro! Kiajn perfektajn amikojn vi trovis!"

"CXefe, kia bruo! SXajnis, ke ili rompas mil glasojn samtempe, dum cent viroj kune kriacxas, kaj dek muzikistoj provas kune superi la bruon de la telera milito."

"Tre bela atmosfero, cxu ne? Mi gratulas vin. Estis kuragxe resti tie."

"Jes. Kia vivo! Cetere, mi estas kuragxa, cxu vi neniam rimarkis?"

"Mi ne konas vin suficxe, sed via kuragxo ne mirigas min."

Bela, kuragxa, riskema, aventurema, bonkora: vi estas la perfekta virino. Sed pri via perfekteco ni havos aliajn okazojn paroli. Kio okazis post la telera, glasa kaj turkakafa milito?"

"Mi rimarkis tre bedaŭrindan aferon, nome, ke la blondulo ne plu troviĝas en la restoracio. Li certe foriris, dum mi tiom interesigxis pri la intersoldata milito. Mi vere bedaŭras mian mankon de observemo. Sed kion fari? Bedaŭri ne helpas, Mi fusxis mian taskon. Mi provos ne fusxi gxin alifoje."

"Nu, prave, estas tre bedaŭrinda afero. Ecx se nur cxar gxi montras, ke vi tamen ne estas plene perfekta. Sed mi almenaŭ gxojas pri unu afero: vi fakte ne tiom interesigxis pri _via_ blondulo. Do eble vi pravas, eble li ne estas _via_ blondulo, eble vi tamen preferas vian karan brunharan amikon Tom."

"Eble, eble. Sed cxu vi vere scias, kial mi fortunis miajn okulojn de tiu blondulo, kvankam mi antaŭe decidis plej multe informigxi pri li?"

"Nu, versxajne cxar..."

"CXar unu el tiuj junaj soldatoj estis tiel bela viro!"

DEMANDOJ (16)

Kion faris la junulo, post kiam li eliris el la vendejo?

Kien li subite eniris?

Kial Linda hezitis sekvi lin tien?

Kiel aspektis la restoracio?

Kion mangxis Linda?

Kion faris la soldatoj?

Kia estas Linda?

Kio estas Linda?

Kion rimarkas Linda post la telera milito?

NOTOJ

Nun vi devas lerni kelkajn novajn vortojn. La unua vorto versxajne ne estas por vi nova; gxi estas la vorto "ESPERANTO". Se vi tion ne jam sciis, nun mi informas vin: Esperanto estas la nomo de tiu cxi lingvo, kiun vi nun lernas.

Ne ridu tro pri tiu klarigo! En kelkaj lingvoj Esperanto ja havas alian nomon. Ekzemple, en la lingvo, kiun parolas pli da homoj ol iun alian lingvon en la mondo, Esperanton oni nomas "shi4 jie4 yu3". CXu vi tion jam sciis? Mi gratulas! Aux cxu eble tiu granda lingvo estas via lingvo?

La aliaj vortoj, kiujn mi volas nun klarigi, estas vortoj, kiuj helpos nin paroli pri la lingvo.

Ekzistas en Esperanto kvar grandaj vortklasoj (vortospecoj):

SUBSTANTIVOJ (o-vortoj), kiuj montras ajxojn: tablo, knabino, spegulo, libero, amo,...

ADJEKTIVOJ (a-vortoj), kiuj montras ecojn: bela, juna, granda, studenta, kasxa,...

VERBOJ (kun finajxoj "-i", "-is", "-as", "-os", "-u", "-us"), kiuj montras agojn aux situaciojn: esti, scii, rigardi, proksimigi, amikigxi,...

ADVERBOJ (e-vortoj), kiuj montras manierojn: tute, kompreneble, versxajne, fakte, kasxe,...

Aliaj vortklasoj, pri kiuj ni volos paroli, estas:

PREPOZICIOJ, kiuj montras rilatojn: de, al, kun, pri, da,...

PRONOMOJ, kiuj resendas al substantivoj: mi, ni, vi, li, sxi, gxi, ili, si, oni.

ARTIKOLO, kiu montras konatecon: la.

EKZERCOJ (16)

Nun mi povas klarigi, kiel "kia" kaj "kiel" estas malsamaj.

Per "kia" oni demandas pri eco, do pri adjektivo (a-vorto).
Per "kiel" oni demandas pri maniero, do pri adverbo (e-vorto).

"KIA estas via amiko?" - "Li estas bela."
"KIEL vi mangxas?" - "Mi mangxas malrapidE."

SXia vizagxo subite igxis rugxa.
"KIA gxi igxis?" - "GXi igxis rugxA."
"KIEL gxi igxis rugxa?" - "Subite."

Metu la gxustan vorton! CXiu mankanta vorto estas unu el:
kiel, kia, kian, kiaj, kiajn.

Kun ___ sako li eliris? - Li eliris kun papera sako.

___ li forveturos? - Mi pensas, ke li forveturos auxte.

___ numeron vi notis? - Mi notis lian auxtan numeron.

___ vi sekvis lin? - Mi sekvis lin iom malproksime.

___ li estis vestita? - Li estis vestita per multkoloraj vestoj.

___ vi sentas vin hodiaux? - Mi sentas min tre bone, dankon!

___ estas via sano? - Multe pli bona ol hieraux.

___ virojn sxatas Linda? - SXi sxatas blondulojn.

___ vi ekkonis lin? - Ni estis en la sama lernejo.

___ restas Gerda? - SXi restas soifa.

CXAPITRO 17 (DEK SEP)

"Sed kial, kial, kial?" diris la policano preskaux krie al sia edzino, kiu estis lia plej helpema kunlaboranto. "Diru al mi kial, kaj mi solvos la problemon. Oni ne kaptas homon por la simpla plezuro travivi aventuron! SXi ne estas ricxa. Ne kun la espero ricevi monon ili sxin kaptis. SXi cxiam vivis plej trankvilan, honestan vivon. Do, ne cxar sxi enmiksas sin en iun kriman agadon ili sxin kaptis. Pro kio do? Por kio?"

"SXi instruas, vi diris al mi. Kion do sxi instruas? Kio estas sxia fako?"

"SXi instruas historion, sed sxi estas specialisto pri la sekretaj lingvoj de la deksepa kaj dekoka jarcentoj."

"Pro tio versxajne sxi malaperis, sed ni ne trovos la motivon uzante nur nian imagon. Ni prefere uzu la faktojn. Ni provu kunmeti ilin, rekunmeti la sinsekvon de la okazajxoj. Kiel la afero komencigxis?"

"Ni ne scias multon. Mi raportu jene. Du gestudentoj -- Tom kaj Linda -- rimarkis, ke alta blondulo metas ion en la tason de Gerda. Ili rimarkis pro lia kasxa, sxtela maniero agi. Iom poste, Gerda eliras el la memserva restoracio tra la pordo koridora. Tuj poste auxdigxas bruoj, kvazaux iu falus. Bob, kiu aligxis al Tom kaj Linda intertempe, eliras kune kun Tom. Ili trovas Gerdan en la koridoro: sxi kusxas senkonscia. Tom foriras sercxo al helpo, dum Bob gardas la junan profesorinon. Kiam Tom revenas kun la flegistino, Gerda malaperis, sed cxi-foje Bob estas senkonscia, batita al-kape. Intertempe la blondulo eliris tra la alia pordo de la memserva restoracio, kaj sekvis Linda. SXi sukcesas kunveturi en lia auxto, sed ne sukcesas igi lin diri ion helpan. Tamen sxi notas la numeron, markon kaj tipon de la auxto..."

"CXu la auxto estis lia? CXu ne estis sxtelita veturilo?"

"Ne. Versxajne li ne suspektis, ke iu suspektos ion. Kiam sxi petis, ke li veturigu sxin, tio al li ne placxis, sed li versxajne opiniis, ke estos ecx pli suspekta malakcepti sxin."

"Vi do scias, kiu li estas, cxu ne?"

"Jes, ni kontrolis. Estas la frato de frauxlino Marta, unu el la universitataj flegistinoj, tiu, kiun Tom venigis."

"Interese! Plej interese! La gefratoj eble kunlaboras en iu malhonesto agado. Kion ili respondas al via demandado pri tiuj strangaj okazajxoj?"

"La flegistino nur rediras la samon, kiel Tom. Kaj la blondulon ni ankoraux ne pridemandis."

"Kial?"

"Por ke li ne suspektu, ke ni suspektas lin. Li estas nia sola sxanco retrovi Gerdan. Bedauxrinde, en la lastaj tagoj, li vivas plej normalan vivon, iris al neniu speciala loko, faris nenion atentindan. Eble li ludis sian rolon kaj gxin finis. La aliaj -- tiuj, kiuj forkuris kun Gerda, kiam Bob, kiu gardis sxin, estis senkonsciigita -- certe estas la gravuloj. Ili devas ekzisti, cxar nek la alta blondulo, nek lia fratino Marta povis forporti Gerdan. Se evidentigxos, ke la tasko de la blondulo estis nur faligi ian dormigan substancon en la trinkajxon de Gerda, ni lin pridemandos. Ni gxis nun esperis, ke li kondukos nin al la malaperinta belulino. Sed pli kaj pli sxajnas, ke

tio ne okazos.

DEMANDOJ (17)

Pri kio parolas la policano?

Kion precize instruas Gerda?

Kiu estas la alta blondulo?

Kiu estas Marta?

Kial oni ankoraux ne pridemandis la blondulon?

Kiel la policano esperas retrovi Gerdan?

NOTOJ

Jen ankoraux kelkaj vortoj, kiujn ni uzos por paroli pri la lingvo.

Grupon de vortoj kun verbo en la centro oni nomas FRAZO. Jen ekzemplo:

Linda rigardas la blondulon.

Frazo normale havas subjekton. La SUBJEKTO estas tio, kio faras la agadon de la verbo. En tiu cxi frazo "Linda" estas la subjekto.

Frazo ofte havas objekton. La OBJEKTO estas tio, al kio la agado de la verbo estas farata. En cxi tiu frazo la objekto estas "la blondulon".

Oni montras la objekton aux per prepozicio ("Linda rigardas al la blondulo") aux per la finajxo "-n". Tiun finajxon "-n" oni nomas AKUZATIVO. Kiel vi jam lernis, oni uzas akuzativon ne nur por montri la objekton en frazo, sed ankaux por aliaj aferoj.

* * *

Jam en la oka cxapitro vi lernis pri la pronomo "si".

La pronomo "si" estas la REFLEKSIVA PRONOMO de Esperanto. Esprimoj uzantaj gxin estas REFLEKSIVOJ.

Kiel vi jam scias, "si" resendas al la subjekto. Ekzemple:

Linda vidas sin.

signifas:

Linda vidas Lindan.

Oni devas scii, ke "si" resendas al la plej proksima subjekto. Normale tio estas la subjekto de la plej malgranda frazo (aux "subfrazo"), en kiu gxi aperas. Do en la frazo:

Tom scias, ke Linda vidas sin.

"si" resendas al "Linda" (la subjekto de "vidas"), ne al "Tom" (la subjekto de "scias").

Pro tio, "si" neniam povas esti mem la subjekto aux parto de la subjekto de iu verbo. Ekzemple, jena frazo estus tute neebla, se oni enmetus la vorton "sia":

Linda pensas, ke ___ opinio estas prava.

En tiu frazo "sia" devus resendi al la subjekto de "estas", kiu estas... "sia opinio". Neeble!

En cxi tiu cxapitro estas pli malfacila ekzerco pri refleksivoj.

EKZERCOJ (17)

Nun vi scias kvar vortojn, kiuj aspektas simile:

PER, POR, PRI, PRO.

PER montras ILON: Mi venis per auxto.

POR montras CELON: Mi acxetis kafon por vi (por trinki).

PRI montras TEMON: Mi parolis/lernis pri historio.

PRO montras KIALON: SXi sxatas lin pro liaj blondaj haroj.

(CELO = tio, kion oni volas havi aux fari.)

Enmetu unu el tiuj vortoj en cxiun lokon:

Mi multe lernadis ___ lingvistiko ___ sukcesi en la universitato.

___ la malfrua horo mi decidis veturi ___ auxto, ___ esti pli rapida.

___ kio temas? - Mi ne scias; mi jxus alvenis.

Mi dankas vin ___ via helpo.

___ la bruo en mia angulo, estis ___ mi tre malfacile auxdi.

Mi scias certe ___ tio, ke mi vidis gxin ___ miaj propraj okuloj.

SXi venis ___ instrui kriptajxo-sciencan, sed mi neniam auxdis ___ tiu fako.

Ekzemplo:

{Tom} scias, ke {Linda} rigardas al {Tom}.

---> Li scias, ke sxi rigardas al li.

Forigu la vortojn kun "{}"!

Marko pensas, ke {Marko} rompis {la} tason {de Marko}.

Marko pensas, ke {Tom} rompis {la} tason {de Marko}.

Tom pensas, ke {Tom} rompis {la} tason {de Marko}.

Tom pensas, ke {Tom} rompis {la} tason {de Tom}.

Tom pensas, ke {Marko} rompis {la} tason {de Tom}.

De Petro {Linda} auxdas malveran rakonton pri {Linda}.

De Petro {Linda} auxdas, ke Tom rakontis malverajxon pri {Linda}.

Ivano scias, kie {Petro} kasxis {la} tason {de Petro}, sed {Ivano} ne scias, kie {Petro} kasxis {la} tason {de Ivano}.

{Linda} timas, ke la spiono sekvas {Lindan} tra la urbo.

{Petro} timas, ke {Linda} amas {Lindan} pli ol {Petron}.

{Linda} cxiam pensas, ke {la} opinio {de Linda} estas prava.

Marko diras, ke {Petro} perdis {la} tason {de Marko}.

Sed Petro diras, ke {Marko} perdis {la} tason {de Marko}.

Linda ne scias, ke {Marko} {Lindan} amas.

Linda ne scias, ke {Marko} {Gerdan} amas.

CXAPITRO 18 (DEK OK)

"Via situacio ne placxas al vi, cxu? Vi dezirus sxangxi gxin, cxu ne? Nu, estas facile sxangxi vian situacion.

"Vi sxatus mangxi ion, cxu ne? Pecon da pano vi deziras, tute certe. Aux cxu frukton? Jen, rigardu, mi havas pomon kaj orangxon por vi. Kiel belaj ili estas! Plenaj je suko, evidente. Se vi estus konsentinta labori por ni, vi jam estus plene sata. Kaj jen io alia: kuko. CXu ne bonega, belega, mangxinda kuko? Ankoraux varma, jxus bakita. Tusxu, sentu mem, kiel placxe varmeta gxi estas. Vi malsatas nur pro via stulteco. Se vi estus sagxa, vi konsentus fari la etan laboron, kiun mi petas de vi, kaj vi tuj ricevus la mangxajxojn. Mi bedaخرas, ke vi estas tiel obstina. Estas bedaخرinde, vidi tiel bela knabino suferi pro malsato. Mi sincere bedaخرas vian obstinecon. Nur eta "jes", kaj cxio cxi estos via."

Li sxajngigas sin afabla, sed estas io tre acxa en lia vizagxa esprimo. Gerda sentas sin pli kaj pli malforta. Estas varme en cxi tiu cxambracxo, kio ne estas facile elportebbla. Krome, sxi malsatas, kaj la vido de tiu pomo kaj de tiu orangxo estas vere suferiga. Kaj tamen sxia devo estas diri "ne".

"CXu vi legis la dokumenton, cxu vi komprenis gxin?" li aldonas, kvazaux espere.

Kompreneble sxi legis: sxi estis scivola. Almenaux sxi bezonis scii, kial oni sxin kaptis kaj senigis je libereco. Tial sxi legis. Estis malfacile kompreni, komence, sed iom post iom sxia memoro plene revenis, sxi rememoris la principojn de tiu sekreta lingvo, kaj sxi sukcesis kompreni cxion; sxi havis nenion alian por fari. Dum multaj horoj sxi estis sola kun tiu dokumento, kiun ili lasis al sxi. Sed sxi decidis neniam respondi al ili; sxi ja antaux longe promesis al Profesoro Kosadi, ke pri tio sxi cxiam silentos. Neniam sxi sxangxos sian decidon.

"CXu vi legis la dokumenton?" sonas duan fojon la acxa vocxo.

SXi plu silentas, kaj li eliras, furioza. Li eliras kun la pano, la pomo, la orangxo kaj la kuko. Felicxe, ke almenaux ili lasis al sxi akvon, varmacxan akvon, jes ja, apenaux trinkeblan, certe, preskaux ne sensoifigan, prave, sed tamen akvo. Malsaton eblas pli malpli elporti, sed soifon ne.

Minutoj pasas. Multaj minutoj. Unu horo, du horoj, cxu tri horoj? CXu multaj horoj? Kiel scii? Ne estas horlogxo sur la muro, kaj ili prenis sxian brakhorlogxon. La lumo apenaux sxangxigxas en la cxambro, pro la nemoveblaj fenestro-kovriloj. CXu estas frue, cxu estas malfrue, sxi tute ne povas scii. Tago, nokto, mateno, vespero cxi tie estas samaj. Sunlumo neniam envenas.

Kaj jen la acxulo revenas, kun radio-kaj-kased-aparato. Li enmetas kasedon, kaj irigas la aparaton. Eta, plenda plorema vocxeto auxdigxas, kaj sxiras la koron de Gerda:

"Patrino, patrineto mia, mi petegas vin. Faru, kion ili volas. Ili kaptis min. Mi ne scias, kie mi estas. Estas terure. Mi timas. Mi tiom deziras reiri hejmen. Mi petegas vin, faru tion, kion ili deziras. Se ne, ili faros malbonon al mi. Ili ne diris, kion. Ili ne volas diri. Sed mi scias, mi sentas, ke estos terure. Kompatu min, kara, kara patrino. Kompatu vian filinon. Mi timegas. Rapidu, rapidu, ke plej frue ili liberigu min. Ili ne volas, ke mi parolu pli longe, sed mi havas paperon kaj plumon, kaj mi tuj skribos leteron al vi. Mi nur petegas: obeu ilin!"

"Jen la letero," li kriacxas, kaj post ridacxo li aldonas:

"Nu, tio versxajne suficxos. Mi revenos post iom da tempo. Mi estas certa, ke vi igxos sagxa, finfine. Kaj jen. Prenu cxi tion, gxi helpos vin pensadi." Kaj tion dirante, li jxetas al sxi belegan pomon. Gerda sentas sin, kvazaux Eva cxe l' serpento.

DEMANDOJ (18)

Kiu parolas komence de la cxapitro, kaj pri kio?

Kiel sentas sin Gerda?

Kiom facile sxi legis la dokumenton?

Kial sxi ne diras, kio estas skribita en la dokumento?

Kion kunportas la acxulo, kiam li revenas, kaj kial?

Kia estas la vocxo de la filino de Gerda?

Kion Gerda ricevas por mangxi?

NOTOJ

CXu vi scias, kion signifas "signifas"? Se ne, jen klarigo:

"SIGNIFI" estas "doni ideon", "esti komprenata en certa maniero".
 "SIGNIFO" estas la ideo donata aux komunikata. Oni povas paroli pri la signifo de vorto ("Perdi" signifas "ekmalhavi", ekzemple) aux de io alia (Rugxa lumo povas signifi "Haltu!").

Por la sekvanta ekzerco vi devos parigi la vortojn kaj la signifojn.
 "Centro" kaj "mezo" estas bona paro, cxar "centro" signifas mezon (ne precize, sed preskaux).

EKZERCOJ (18)

Ekzemplo:

centro :

---> centro : mezo

Trovu la vortojn!

ama(n)to aux sxata(n)to :

ameti :

centro :

en kiu loko :

enakvigi :

esprimi felicxon pro io ricevita :

esti atenta, sin okupi :

farebla sen granda laboro :

fari tre malbone :

grupo de amikoj (ekzemple) :

grupo de lernantoj :

io kutime farata :

kun bone funkcianta korpo :

mallasta :
ne kun :
ne paroli, fari nenian bruon :
necxiutaga okazajxaro :
ofta okulkoloro de blonduloj :
parto de parolo :
perdi la konscion :
pro kio :
rigardi kiel veran :
risko de malbono :
senti la suferojn de alia homo :
sesdek sekundoj :
tempo en historio :
tia, ke oni devas tuj fari gxin :
tre tre :
vidilo en kapo:
viro aux virino :

La vortoj estas:

amiko, aventuro, bani, bluo, dangxero, danki, ege, epoko, facila,
fusxi, homo, kial, kie, klaso, kompati, kredi, mezo, minuto, okulo,
rondo, sana, sen, silenti, sveni, sxati, tradicio, unua, urgxa, vorto,
zorgi

CXAPITRO 19 (DEK NAUX)

Petro: Eble ni forkuris tro rapide. CXu vere fantomoj ekzistas?

Ralf: CXu vi volas raporti pri la vocxo al viaj gepatroj? Se jes, vi ne plu estas mia amiko. Se ili scios, ke ni ludis en la malpermesita domacxo, vi...

Petro: Ne. Mi tute ne volas diri al la gepatroj, ke ni ludis tie. Tio estas nia sekreto. Mi nur v...

Ralf: Jes. Sekreto kunigas la amikojn. Se vi gardos la sekreton, vi restos mia amiko. Sed se vi malkasxos gxin al granduloj, mi... mi... mi suferigos vin, mi igos vin plori tiel grave, ke neniam plu en via tuta vivo vi forgesos tiun tagon. Kredu min, en via tuta vivo, tio estos la lasta fojo, kiam vi rompis promeson. Kio? CXu tio igas vin ridi?

Petro: Mi ne ridas, mi nur v...

Ralf: Ankaux mi ne ridas. Mi parolas plej serioze. Oni ne ridas pri veraj dangxeroj, cxu? Kaj se vi...

Petro: Sed mi tute ne volas diri ion al la gepatroj. Mi nur...

Ralf: Kaj se vi rakontos gxin en la lernejo, ne estos pli bone por vi. Mi plorigos vin tute same. Mi malpurigos viajn vestojn, kaj via patrino krios furioze kiam vi revenos hejmen. Mi kusxigos vin en akvo kaj sidos sur via kapo. Mi kaptos vin per mia speciala kaptilo kaj veturigos vin en la montaron kaj forlasos vin tie, kaj vi estos tute sola kaj perdita, kaj vi ploros. Vi...

Petro: Vi ecx ne scias sxofori. Mi ne kredas je via kaptilo. Kaj cetere, mi nur...

Ralf: Jes, mi scias sxofori.

Petro: Vi ne rajtas sxofori cxar vi estas tro juna. Kaj vi ne havas auxton.

Ralf: Mi ne zorgas pri tio, cxu mi rajtas aux ne. Se mi farus nur tion, kion mi rajtas fari, mi farus nenion. Mi sxtelos iun veturilon, jes, mi sxtelos veturilon de iu instruisto en la lernejo kaj veturigos vin sur monton kaj lasos vin tie kaj vi ploros. Se vi parolos al iu el niaj samklasanoj aux samlernejanoj, la tuta lernejo ekscios pri la virino el la malnova domacxo, kaj poste la gepatroj...

Petro: Vi diris "virino", do vi ne kredas, ke estas fantomo. Vi do konsentas, ke...

Ralf: Kompreneble mi ne kredas je fantomoj. La virino, kiun ni auxdis, estas virino, kiun mi kaptis kaj gardas tie. Mi planas igi sxin mia servistino: sxi faros cxion, kion mi volos. Kaj se vi parolos pri sxi... Nu, mi ne volas paroli pri tio, kio okazos al vi, cxar vi tro timus...

DEMANDOJ (19)

Kiuj estas Petro kaj Ralf?

Kial Ralf provas timigi Petron?

Kiamaniere li provas timigi lin?

CXu Petro estas timigita?

Kion Ralf rakontas pri la virino?

EKZERCOJ (19)

Ekzemplo:

speco de agado :

---> speco de agado : maniero

Trovu la vortojn!

afero, io pripensebla :

agi farante sian taskon, servon, oficon :

bona sento de komforteco aux gxoj :
de tiu speco :

deziranta nenion alian ol tio, kion oni havas :
ekhavi :

ekmalfunkcii :

en bezonata kiomo :

enpreni akvon :

esprimi doloran senton per neparolaj sonoj :

facile uzebla, bona por la celo :

fari tre malplacxan senton :

granda en la direkto nek de longo nek de diko :

gxusta arangxo aux dismetado :

havigi al si intersxangxe por mono :

iri, sed ne pasxante :

je cxiu tempo :

konsenti ricevi ion :

kontrauxkrima administraxo :

kunmeti tiel, ke oni ne povas facile rekoni la partojn :

malesti, foresti, ne esti suficxe multe :

malfaciligi aux malhelpi ies movojn, maloportuni al iu :

meti en situacion aux pozicion, kiu malebligas eniron aux eliron :

ne dauxrigi :

ordigi, prizorgi :

placxa per gxentileco, amikeco :

povanta bone kaj gxuste decidi :

preni kun si, havi kun si :

pro dubo halti ne sciante, kion fari :

proksime al :

pura, travidebla, komprenebla :

rebonigi, refunkciigi :

rediri, refari :

senakva aux kun malmulte da akvo :

senti bezonon trinki :

senti strangecon, neatenditecon, nekutimecon :

senvivigxi :

sidilo :

speco de agado :

ujo por trinkajxo :

La vortoj estas:

acxeti, afabla, akcepti, apud, arangxi, cxiam, dolori, fermi, fini,
funkcii, glaso, gxemi, gxeni, heziti, klara, kontenta, largxa,
maniero, manki, miksi, miri, morti, objekto, oportuna, ordo, paneli,
plezuro, polico, porti, ricevi, ripari, ripeti, sagxa, segxo, seka,
soifi, suficxa, tia, trinki, veturi



CXAPITRO 20 (DUDEK)

Pasxoj. Oni pasxas sur la strato. Gerda auxskultas atente; sxi antauxsentas, ke io grava baldaux okazos. Bruo de multaj homoj. Ili venas. Ili sxajnas multaj, laux la bruo: cxu nun oni venos grupe por sxin suferigi? SXlosiloj. Bruo de sxlosiloj trans la pordo. Iu enmetas sxlosilon en la seruron. SXi scias, ke ne estas sxia kutima vizitanto. Li ne agas tiel. Li enmetas tre rapide la sxlosilon, gxin turnas, eniras. Ne cxi tiu. Li provas unu fojon. Ne sukcesas. Plia bruo de sxlosiloj. Alian fojon li provas, sen pli da sukceso. Li provas ree kaj ree per diversaj sxlosiloj. Auxdeblas, ke li ne konas la seruron. Kiam li enmetis sxlosilon, li tenas gxin laux diversaj direktoj, kvazaux li ludus per gxi, versxajne cxar li esploras nekonatan seruron.

Kaj jen li fine sukcesas! Li eniras.

"Polico!" li diras, kaj Gerda devas superi fortan emon salti al li por lin kisi. Estas alta viro, maldika, kun nigraj haroj kaj verdaj okuloj, kiu sin tenas tre digne.

Post li venas aliaj homoj, multe pli junaj. SXi jam vidis tiujn vizagxojn. Studentoj ili estas. Ilia sinteno estas tute malsama: senstrecxa.

"Tiuĝ gejunuloj multe helpis min," la policano klarigas. "Ni ne estas sufcixe multaj en la polico por cxion fari, kaj ilia helpo estis tre bonvena." Kaj li prezentas ilin: Tom, Bob, Linda. Kiam sxi auxdis la pasxojn, Gerda imagis, ke venas sep, ok, eble naux homoj, sed almenaux ses; fakte, ili estas nur kvar.

"Mia filino...?" sxi demandas, kaj sxi apenaux povas eligi la du vortojn, tiom sxi timas la respondon.

"Savita: sxi nun estas en via hejmo, kun via edzo. Viaj kaptintoj estas amatoroj, kiuj agis fusxe. La etulino estis cxe la onklino de tiu f-ino (=frauxlino) Marta, la universitata flegistino. Ni facile trovis sxin. SXi tre gxojis revidi la patron, kaj la hejmon, kompreneble."

"Ho, mi dankas, mi dankegas vin. Via diro sxangxas mian tutan vivon. Sed diru: kiel vi alvenis cxi tien? Kiel vi malkovris, ke ili tenas min ensxlosita en cxi tiu domacxo?"

"Du knaboj rakontis pri vocxo en cxi tiu malnova, forlasita domo. Dank'al ili... Sed nun rakontu _vi_. Kion viaj kaptintoj celas? Kio estas ilia celo? Kial vin teni mallibera?"

"Ili volas, ke mi traduku malnovan dokumenton. Mi malkonsentis. Tiam ili opiniis, ke perforte ili sukcesos. Ili preskaux sukcesis. Per malsato, unue, kaj poste per la mesagxo de mia filino. La malsato ne estis facile elportebbla, kredis min, sed la mesagxo sur-kaseda...! Fakte mi terure malsatas nun. Mi petas, cxu iu el vi bonvolus iri acxeti mangxajxon por mi? Io ajn estos bonvena."

Linda foriras por acxeti mangxajxojn.

"Vi rakontos al mi, cxion, senmanke," sxi diras al la du knaboj elirante.

Gerda raportas pri la dokumento; sxi tenas gxin enmane kaj tradukas, vorton post vorto; krome, sxi donas cxiujn necesajn klarigojn.

La policano kapjesas komprene. Gerda klarigas al li ankoraux

pli pri la kondicxoj de sia mallibereco. Kaj jen la policano havas ideon.

"Bob, cxu vi konsentus kasxi vin sub la lito, se iu envenus?"

"Kial?"

"Mi havas planon. Mi sxatus, ke ni cxiuj foriru, krom vi kaj Gerda, kaj ke sxi diru al la kaptinto, ke sxi konsentas klarigi al li, kio estas skribita sur tiu papero, mi volas diri: sur tiu malnova dokumento. Ili tiam agos laux la dokumento, kaj ni kaptos ilin tiom pli facile. Sed tamen, ni ne rajtas riski, ke Gerda suferu. Kiu scias? Kiam sxi ne plu estos necesa por ili, ili povus... Nu, vi komprenas. Vi restos cxi tie, kaj kiam vi auxdos pasxojn proksimigxi, vi kasxos vin sub la lito, kaj bone atentus cxion, kio okazas. Gerda diris, ke cxiam venas nur unu persono, unu viro, maldika ulo, ne tre forta. Fortulo kiel vi tuj superos lin, se necese."

Bob konsentas, kvankam, se diri la veron, kun iom duba esprimo.

DEMANDOJ (20)

Kion auxdas Gerda?

Kiel sxi scias, ke ne estas la kutima vizitanto?

Kiujn prezentas la policano al Gerda?

Pri kio estas la unua demando de Gerda?

Kiel la kaptintoj celis igi Gerdan kunlabori?

Por kio foriras Linda?

Kial la policano petas, ke Bob restu kun Gerda?

EKZERCOJ (20)

Ekzemplo:

senti vivan plezuron :

---> senti vivan plezuron : gxoji

Trovu la vortojn!

afabla en kutima kaj gxusta maniero :

aro de lokoj trairataj por iri de unu loko al alia :

dolore senti perdon, esti malkontenta pro ia faro aux manko :

ekkonscii pri :

ekmaldormigi :

emi ion fari pro ofta ripetado :

en iu loko :

en neniuj loko :

esprimi malkontentecon :

esti auxdebla :

faradi pro plezuro :

fari la unuan parton de io :

fari muzikon pervocxe :

fari vocxbruon por montri subitan gxojon :

fermi per seruro :

forte auxdebla :

grupo de homoj kun samaj tradicio kaj historio :
 havi permeson fari ion :
 havi samajn ecojn kiel :
 homido :
 homo konsiderata kiel konscia kun devoj kaj rajtoj :
 iri per egalaj pasxoj :
 je iu tempo :
 kapabla iri kaj fari lauxplacxe :
 klara, certa, perfekte gxusta :
 kredi, ke iu dezirata realigxos :
 meblo por kuxado kaj dormado :
 meti ion sur :
 montri doloron per okulakvo kaj gxemetoj :
 natura altegajxo :
 ne kapabla bone pensi :
 ne miksita, sen nedezirata aldono :
 okupi la atenton de iu :
 parolsono de homo :
 parto de homa korpo, cxe kies fino estas mano :
 parto de muro, kie povas enveni lumo kaj aero :
 perdi memoron pri :
 pervocxe fari lauxtajn sonojn :
 pluestadi, ne esti finita :
 prezenti ideon pri io farinda :
 rapide iri piede :
 rilati, interesi, esti la temo de :
 sciigi okazintajxojn per vortoj :
 senmanka :
 sentanta eluzitecon de siaj fortoj :
 senti vivan plezuron :
 sentigi emon fali (movigxi malsupren) :
 sesdek minutoj :
 sxtonego :
 trankvila kaj sentima antaux dangxero :
 translokigi :
 tre mallonga tempodauxro :
 tuto da kondicxoj kaj cxirkauxajxo :
 tute kontenta, bonxanca :
 vira naskiginto de ido :

La vortoj estas:

bedauxri, brako, dauxri, esperi, felicxa, fenestro, forgesi, gxentila,
 gxoji, horo, ie, iam, infano, interesi, kanti, komenci, koncerni,
 kovri, krii, kuri, kuragxa, kutimi, laca, lauxta, libera, lito, ludi,
 marsxi, momento, monto, movi, nacio, nenie, patro, perfekta, persono,
 pezi, plendi, plori, preciza, proponi, pura, rajti, rakonti, ridi,
 rimarki, roko, simili, situacio, soni, stulta, sxlosi, vekti, vocxo,
 vojo

CXAPITRO 21 (DUDEK UNU)

Gerda sentas sin pli bone. SXi jxus finis mangxi. Foriris Linda, Tom kaj la policano. SXi parolas kun Bob, tre mallauxte. Ili ja devas atenti, cxu iu proksimigxas aux ne. Felicxe, ecx sen speciale auxskulti, sxi cxiam bone auxdis, suficxe frue, kiam la acxulo venas. Bob placxas al sxi. Li estas granda kaj forta, kun esprimo de bonkora, sindonema hundo.

Ili parolas pri siaj vivoj, pri la lastaj okazajxoj. Kiam sxi parolas pri sia edzo, lia vizagxo sxangxigxas, alprenas iom malgxojan esprimon. CXu li enamigxus al sxi?

Kaj jen auxdigxas pasxoj. Bob saltas sub la liton, provas rapide trovi ne tro malkomfortan pozicion sub la lito. "Ne brui," li diras al si, "plej grave, plej necese estas ne brui!"

Envenas la gardanto, la acxa malgrasulo, kiu, per siaj vortoj pri mangxo, tiom suferigis Gerdan. Sed cxi-foje sxi povos kontentigi lin. Kia plezuro!

"Mi konsentas," krias Gerda, kiam la maldika acxulo malfermas la pordon. "Mi akceptas vian proponon. Mi ne plu elportas. Mi tradukos vian acxan paperon. Liberigu mian filinon, kaj donu al mi mangxi, mi petas."

"Jen," simple diras la maldikuleto, kaj li elprenas el sako panon, kolbason, kukon, fruktojn, cxokoladon, kaj ecx botelon da lakto. Gerda mangxas silente; sxi povus mangxi ecx pli, kvankam sxi jxus iom mangxis. Bob, auxdante la mangxobruon, pli kaj pli malsatas, sed kion li povus fari?

"Nu, bonvolu klarigi al mi, kio estas skribita sur tiu malnova papero," la vizitanto diras.

Kaj Gerda klarigas. SXi rakontas, ke temas pri la trezoro de la Lumosercxantoj. La Lumosercxantoj estis sekreta societo, kiu naskigxis en la dekkvina jarcento kajauxris, jen forta, jen malforta, laux la epokoj, gxis la mezo de la dekoka jarcento. GXi havis membrojn en tre multaj landoj, en popoloj plej malsamaj. Katolikoj, protestantoj, ortodoksuloj, judoj, islamanoj, budhanoj kaj aliaj estis membroj de tiu internacia aux supernacia societo. Ilia celo estis sekrete labori por la unuigo de la mondo, de la popoloj, por la harmoniigo de la religioj, kaj por ke la malsamaj tradicioj interkomprenigxu. Ili estis morala kaj filozofia elito. Ili estis elpensintaj sekretan lingvon, kiu ebligis al ili komuniki, el kiu ajn lando aux popolo ili estis. La sxtatoj, kiam ili malkovris la ekziston de la Lumosercxantoj, ektimis tiujn homojn, miskomprenis iliajn celojn, kaj ilin persekutis. Inter la Lumosercxantoj, tre ricxaj homoj trovigxis. Tial, laux diversaj malnovaj dokumentoj, ilia trezoro estas multvalora. Tiu cxi papero estas fotokopio de dokumento, kiu tre precize indikas, kie oni kasxis la trezoron.

Gerda klarigas, tradukas, kaj la viro notas cxiun detalon sur etan notlibron. Kiam sxi finis, li diras:

"Dankon. Nun ni havas, kion ni deziris. Mi foriras. Mi lasas vin tie cxi. Ni decidus poste, kion ni faros el vi. Adiaux, belulino, adiaux."

Nur post kiam la pordo fermigxis kaj la bruo de la pasxoj forsvenis, auxdigxas de sub la lito vocxo, kiu diras:

"CXu vi lasis al mi iom de tiu kuko?"

DEMANDOJ (21)

Pri kio parolas Gerda kaj Bob?
 Kio okazas post iom da tempo?
 Kion promesas Gerda?
 Pri kio temas la papero?
 Kiuj estas la Lumosercxantoj?
 Kial la sxtatoj persekutis ilin?
 Kiam la acxulo foriras?

EKZERCOJ (21)

Ekzemplo:

kunligita aro :

---> kunligita aro : grupo

Trovu la vortojn!

administrejo por transportado de leteroj :
 agrable sentiganta, kiel sukero :
 ano de la militistaro :
 antaŭe pripensita kaj ordigita arangxo de realigota agado :
 aro de ajxoj kun samaj ecoj :
 arto arangxi sonojn en maniero placxa por auxskultado :
 cxe la flanko kontraŭa al tiu de la koro :
 cxiu el la okazoj, kiam io okazas :
 dekstra aux maldekstra parto :
 ebleco de sukceso :
 elstara parto meze de vizagxo :
 estigxi, farigxi en iu loko aux momento :
 farota laboro aux servo :
 fordoni ion intersxangxi por mono, malacxeti :
 frua parto de tago antaux tagmezo :
 granda movebla objekto por uzado en domo :
 gxentile esprimi al iu sian kontentecan pro ties sukceso aux felicxo :
 io plata, el kio oni mangxas :
 je la tago antaux la nuna tago :
 korpaj ludoj :
 kovri la korpon per io portebla :
 kunligita aro :
 malalta aux maldika :
 maldika ajxo, sur kiu oni skribas, kaj el kiu oni faras librojn :
 mallonga memoriga skribajxo :
 mallonge antaŭe :
 mangxajxo kun multe da akvo :
 okazanta pli antaŭe, proksime al la komencotempo :
 pansimila sed pli dolcxa bakajxo :
 perforte dispecigi :
 reciproka mortigado inter malamikaj homgrupoj :
 restoracia servisto, kiu alportas la trinkajxojn kaj mangxajxojn :
 rugxeco, blueco, bruneco, verdecio, nigrecio, ktp :
 rugxete terkolora :
 sciigi al alia persono, kion oni auxdis, vidis kaj trovis :

sin movi tra la aero :
speco de simpla mangxajxo :
supra kovrilo de cxambro :
vere ekzistanta kaj kontrolebla :
vojo inter domoj en urbo :

La vortoj estas:

bruna, dekstra, dolcxa, flanko, fojo, flugi, frua, gratuli, grupo,
hieraux, jxus, kelnero, koloro, kuko, mateno, meblo, milito, muziko,
nazo, noto, okazi, pano, papero, plafono, plano, plata, posxto,
raporti, reala, rompi, soldato, speco, sporto, strato, supo, sxanco,
tasko, telero, vendi, vesti

CXAPITRO 22 (DUDEK DU)

Baldaux venis la policianoj, por ilin liberigi. Gerda reiris hejmen, al siaj filino kaj edzo. Sed Bob rapidis al la flughaveno. Li volis cxeesti kun Linda kaj Tom, kiam la policano arestos la kaptintojn de Gerda.

Estis suficxe multekosta vojaĝo, sed la familio de Gerda -- ricxa familio -- pagis por ili la bileton, tiel esprimante sian dankemon.

CXar la policano kaj la gejunuloj sciis pli frue ol la sxtelistoj, kie trovigxas la trezoro, ili havis multe da tempo por prepari sin. Ili ne dubis, ke la aliaj venos kiel eble plej baldaux, kaj ke la tuta bando venos. Kutime tiaj homoj ne fidas sin reciproke, kaj volas kune cxeesti por certigxi, ke neniu kasxos por si parton de la trovajxo.

La loko indikita trovigxis cxe la piedo de monto, en kaverno, kie, videble, neniu pasxis jam de jaroj.

"Felicxe, ke ili ne kasxis tiun trezoron trans la maro, ekzemple sur insulo, kien nur per sxipo oni povas iri. Se estis vere internacia societo, kiel Gerda diris, tio estis ebla, cxu ne?" Tiel parolis Linda.

"Vi pravas," diris Tom. "Mi tute ne sxatus vojaĝxi sxipe. La maro cxiam igas min malsana. Mi sxatas rigardi la maron, resti cxe la maro, libertempi apud la maro, sed ne vojaĝxi per sxipo sur gxi: sxipoj konstante dancas sur la maro, kaj ilia danco tute ne placxas al mi. Felicxe, ke hodiaux oni povas iri preskaux ien ajn aviadile. Aviadiloj preskaux tute ne dancas. Sed ecx aviadiloj nur duone placxas al mi. Plej multe mi preferas, kiam mi veturas sur tero, sur bona firma tero. Mi bezonas sub mi ion pli firman ol akvo kaj aero. Plej placxe estas promeni piede sur bona tera vojo. Mi..."

Sed Linda interrompis lian paroladon, iom strangan en tiuj kondicxoj, en kiuj ili trovigxis:

"Kiam alvenos la trezor-sercxantoj, laux via opinio?" sxi demandis la policanon.

"Morgaux, tute certe. Ili ne povus alveni hodiaux, cxar ne plu estis aviadilo post la nia, kaj auxte ili bezonus la tutan nokton. Versxajne Bob flugos en la sama aviadilo."

La temperaturo estis placxa, kaj bela la vetero. Ili starigis sian tendon en la proksimeco, tamen bone prizorgante, ke gxi ne estu videbla por alvenantoj. La sola maniero, laux kiu la trezorsercxantoj povus alveni antaux la morgauxa tago, estus, ke ili flugu per malgranda aviadilo, speciale luita. Sed lui specialan aviadilon kostas tiel multe, ke plej versxajne ili ne uzos tiun rimedon.

La sekvantan matenon, niaj amikoj vekigxis frue. Tuj la policano kaj la gestudentoj arangxis, ke cxiu el ili, unu post la alia, gardostaros en loko, de kie eblas facile observi la solan vojjon -- aux pli gxuste vojacxon -- laux kiu oni povas proksimigxi al la kaverno, kaj ke cxiu havos en la kaverno sian difinitan kasxejon.

Post tri horoj da atendado, io fine okazis. Linda, kiu gardostaris en la iom alta observejo, faris la deciditan signalon, kaj rapide kuris de supre al siaj kunuloj.

"Auxto alvenas!" sxi kriis.

En tiu ege soleca regiono, kiu povus veni auxte per tiu tera vojacxo, se ne la trezorsercxantoj? La tri atendantoj sin kasxis, cxiu en sia difinita loko, malantaux rokoj, da kiuj oportune trovigxis multe en la kaverno.

DEMANDOJ (22)

Kie trovigxas la loko indikita?

Kial Tom tute ne sxatus vojagxi sxipe?

Kiel oni povas iri preskaux cxien ajn?

Kiom da homoj atendas la trezorsercxantojn?

Kion rimarkas Linda observante la vojon?

EKZERCOJ (22)

Ekzemplo:

ekpreni kaj firme teni :

---> ekpreni kaj firme teni : kapti

Trovu la vortojn!

aliigi :

aparato por montri la horojn :

atenti, zorgi kontraux dangxero aux ebla malbono, teni :

certigi, ke oni ion faros :

detale esplori, cxu io estas gxusta aux gxuste farita :

domo aux loko, kie oni konstante vivas :

ekpreni kaj firme teni :

ekzemplo prezentanta iun specon :

estanta post cxiuuj aliaj :

firme restanta cxe siaj opinio kaj volo :

grava skribajxo :

irigi kun si :

kapti por teni, porti aux uzi; havigi al si; akcepti, ricevi :

kasxe forpreni ion de alia homo :

kontentigi, felicxigi, gxojigi :

kun multe da havajxo, da mono, da io ajn :

kunajxo de objektoj kaj iloj servanta por ion fari :

ne bezonanta mangxajxon :

ne kontrauxstari, vivi kun io gxisfine :

ne tute, sed ne tute ne :

pagilo konsistanta el pecoj kun difinitaj valoroj :

preni kiel rimedon, agi per io por kontentigi bezonon :

provadi por trovi :

rapide forigi de si tra la aero :

scienco pri pasintaj okazajxo; rakonto pri okazintajxo :

sekvi per okuloj kaj kompreni ion skribitan :

sekvi tion, kion volas alia persono :

senti doloron, travivi malfelicxajxon :

sin vidigi, ekmontrigxi, igxi videbla :

skribajxo sendita al alia homo :

solvota demando, malfacilajxo :

sufери pro manko de iu necesa, necesigi ion :

surpaperigi vortojn :

timego :

tio, kio igas iun agi aux opinii en iu maniero :
trairi, preteriri; transirante malaperi, ne dauxri :
trovi la respondon al demando, la rimedon kontraux malfacilajxo :
vira ido de samaj gepatroj :
vira homido :
viro ligita al virino por kunvivado kaj nasko de infanoj :

La vortoj estas:

aparato, aperi, bezoni, dokumento, edzo, elporti, filo, frato, gardi,
hejmo, historio, horlogxo, jxeti, kapti, konduki, kontroli, lasta,
legi, letero, mono, motivo, obei, obstina, pasi, placxi, preni,
preskaux, problemo, promesi, ricxa, sata, sercxii, skribi, solvi,
suferi, sxangxi, sxteli, teruro, tipo, uzi

CXAPITRO 23 (DUDEK TRI)

Post duonhoro, iu envenis. Estis Bob!

"Kie sin kasxas la Lumsercxantoj?" li kriis, "cxu en la mallumo?"

La aliaj sin montris.

"Rekasxu vin, ili tuj alvenos," li diris.

"Kiel vi faris por antauxi ilin?"

"Dank'al Gerda: sxi telefone arangxis, ke veturilo atendu min cxe la flughaveno, kaj ke sxoforo min veturigu cxi tien. Mono solvas multajn problemojn, kaj sxi estas ricxa, kiel vi scias; sxi donis tre precizajn

indikojn por ebligi al la sxoforo trovi la lokon, kaj jen mi estas. Sed niaj trezorsercxantoj tuj alvenos. Ili flugis en la sama aviadilo, kiel mi, kaj kiam la sxoforo min trovis, mi vidis ilin iri al oficejo, kie oni luas auxtojn."

Tom kuris supren al la observejo. Post kelkaj minutoj, la aliaj auxdis lian signalon.

Envenis la kavernon flegistino Marta, sxia frato la alta blondulo, la malgrasulo, kiu rilatis kun Gerda, kiam sxi estis mallibera, kaj du aliaj viroj.

"Profesoro Ronga!" mire diris al si la tri gestudentoj, kaj tuj poste ili aldonis: "Kaj Profesoro Fergus!"

La unua instruis lingvistikon, la dua anglan literaturon.

Laux la malnova dokumento, la trezoro trovigxis en kofro metita en kavo arangxita en la rokoj, kaj la sxtonoj, kiuj gxin kovris kaj kasxis, kusxis laux preciza desegno. Fakte, la gxusta loko estis indikita per signoj tiel multaj, kvankam diskretaj, ke la pasado de l' jarcentoj ne povu forpreni cxiujn. Pro tiuj precizaj indikoj, la gxusta loko igxis rapide trovita. La grupo forprenis la kasxantajn sxtonojn. Montrigxis, ke la kavo estis plenigita per korko kaj diversaj aliaj substancoj, kies celo versxajne estis protekti la kofron kontraux malsekeco.

La kofro, kiun ili eltiris, ne estis tre granda, nek speciale bela aux valora. GXi estis sxlosita. Per siaj iloj, ili gxin malfermis.

DEMANDOJ (23)

Kiel Bob sukcesis antauxi la bandon?

Kiom da trezorsercxantoj envenis la kavernon?

Kio mirigas la tri studentojn?

Kie, laux la malnova dokumento, trovigxas la trezoro?

NOTOJ

En cxapitro 9 vi lernis pri la finajxo "-it-". (La kapo de Bob estis "batita".) En cxapitro 11 vi lernis pri la finajxo "-ant-". (Linda pensas, sin "demandante", cxu...) Poste, en cxapitro 14, aperas la finajxoj "-at-" kaj "-int-". (CXambro "nekonata". Kvazaux sxi estus "laborinta".)

La vortoj kun "-ant-" kaj "-at-" rilatas al la nuno, al la estanteco (al tio, kio okazas aux estas nun). La vortoj kun "-int-" kaj "-it-" rilatas al la estinteco (al tio, kio okazis aux estis antauxe).

Ekzistas ankaux finajxoj "-ont-" kaj "-ot-" por la estonteco (tio, kio okazos aux estos poste). Vortoj kun la finajxoj "-ant-", "-at-", "-int-", "-it-", "-ont-", "-ot-" estas nomataj PARTICIPOJ, kaj tiuj finajxoj estas la PARTICIPAJ FINAJXOJ.

La participoj kun "-nt-" estas la SUBJEKTAJ PARTICIPOJ; ili rilatas al la subjekto de la participigita verbo. Oni nomas ilin ankaux AKTIVAJ PARTICIPOJ.

La participoj kun nur "-t-" estas la OBJEKTAJ PARTICIPOJ; ili rilatas al la objekto de la participigita verbo. Oni nomas ilin ankaux PASIVAJ PARTICIPOJ.

	SUBJEKTA	OBJEKTA
ANTAUXE	-int-	-it-
NUN	-ant-	-at-
POSTE	-ont-	-ot-

Jen kelkaj ekzemploj:

La polico sercxas malaperintan virinon [virinon, kiu malaperis].

La virino estas ensxlosita en forlasita domo [domo, kiun oni forlasis].

Linda rigardas la kriegantajn soldatojn [soldatojn, kiuj kriegas].

SXi iomete timas pro la jxetataj teleroj [teleroj, kiujn oni jxetas].

CXu vi strecxe atendas la venontan cxapitron [cxapitron, kiu venos]?

Kion trovas la kaptotaj krimuloj [krimuloj, kiujn oni kaptos]?

Se la cxefa parolo estas nuna (supre estas "sercxas", "estas", "rigardas",...), oni povas "traduki" la participojn jene:

```
X-inta ---> kiu X-is
X-ita  ---> kiun oni X-is
X-anta ---> kiu X-as
X-ata  ---> kiun oni X-as
X-onta ---> kiu X-os
X-ota  ---> kiun oni X-os
```

Tamen, se la cxefa parolo ne estas nuna, oni normale ne povas tiel simple "traduki". Ekzemple:

"Hieraux matene Bob pensis pri la farota laboro."

Sed eble li faris la laboron hieraux vespere. Se hodiaux oni dirus, ke hieraux matene Bob pensis pri la laboro, kiun oni faros, tio signifus, ke ecx hodiaux la laboro ankoraux ne estas farita. Pli gxusta

"traduko" estas do: Hieraux matene Bob pensis pri la laboro, kiu estis objekto de posta faro.

"Morgaux vespere Bob rigardos la faritan laboron."

Sed eble li faros la laboron morgaux vespere. Se hodiaux oni dirus, ke morgaux vespere Bob rigardos la laboron, kiun oni faris, tio signifus, ke jam hodiaux la laboro estas farita. Pli gxusta "traduko" estas do: Morgaux vespere Bob rigardos la laboron, kiu estos objekto de antauxa faro.

CXu tiu klarigo estas komprenebla? Se ne, tio ne tro gravas, cxar la realo estas multe pli simpla ol mia klarigo. Kompreneble oni normale ne tradukas participojn; oni komprenas ilin sentraduke. "Mangxonta" signifas kvazaux "malsata"; "mangxanta" signifas kvazaux "cxe-tabla"; "mangxinta" signifas kvazaux "sata".

Provu la sekvantan ekzercon, en kiu oni devas reskribi uzante participon!

EKZERCOJ (23)

Ekzemplo:

Mi sercxas monujon, kiun mi perdis.

---> Mi sercxas perditan monujon.

Reskribu uzante participon!

La strangulo parolas al si mem, ne atentante la studentojn, kiuj lin rigardas.

La studento redonas la librojn, kiujn li jam legis.

Kato, kiu mangxis, normale volas dormi.

La policianoj ne rekonos la krimulon, kiun ili sercxas.

Li zorge purigis la auxton, kiun li volis vendi.

En la universitato Marta estas virino, kiun cxiu konas.

SXi provis legi la numeron de la auxto, dum gxi veturas.

Tiam sxi ankoraux havis la monujon, kiun sxi poste perdis.

Li pensis pri la suferoj, kiujn li jam travivis.

Mi plendos pri la segxoj, kiuj malaperis.

Mi devis atendi la buson, kiu venis poste.

SXi longe adiauxis la amikon, kiu devis foriri.

CXAPITRO 24 (DUDEK KVAR)

"Nur papero!" kriis Ronga.

"Ankaux estas libro!" diris Marta, sed jam Ronga lauxtlegis:

"Tie cxi kuxas la Trezoro de la Lumo. Pro la dauxra persekutado, la Sankta kaj Sekreta Frataro de la Lumo-Sercxantoj baldaux cxesos ekzisti. Sed gxia Spirito plu vivos. Iun tagon, homoj retrovos la Sanktajn Principojn kaj rekomencos ilin apliki. Por ili estas cxi tie kasxita la Trezoro de la Lumo.

"GXi estas skribita en la Speciala Lingvo de la Frataro, sed certe homoj trovigxos, kiuj gxin povos kompreni. La Trezoro konsistas el la arto praktike apliki kaj defendi la Veron, la Justecon, la Dignecon, la Respekton al cxiu homo, la Interkomprenon, la Honestecon, la Amon, la Kompatemon kaj la Konon de si mem kaj de sia gxusta loko.

"Por la Frataro, la Spiritaj Valoroj estas la plej altaj. Tial gxia Trezoro estas pure Spiritita.

"Al vi, homo, kiu trovis gxin, trans multaj aux malmultaj tagoj, semajnoj, monatoj, jaroj, jardekoj aux jarcentoj, Saluton kaj Fratecon!"

* * *

Ili sidis en komfortaj braksegxoj en la hejmo de Gerda.

"Kio okazis poste?" cxi-lastata demandis.

"Ni malkasxis nin, kaj mi ilin arestis," diris la policano. "La loka polico estis antauxe informita, kaj ensxloxis ilin."

"CXu vi scias, kiel komencigxis la afero?" scivolis Tom.

"Proksimume. Kiam Marta estis flegistino en la hospitalo, sxi cxeestis kirurgian operacion de historiisto, Prof. (=Profesoro) Kosadi. Kiam cxi-lastata estis duone dormanta, duone vekigxanta, li parolis nekonscie pri la trezoro de la Lumosercxantoj. Li diris, ke temas pri malnova societo, elita, tre ricxa, pri kies trezoro li eksciis hazarde legante en la Vatikana Biblioteko."

"Jes," dauxrigis Gerda. "Tiun parton de la afero mi konas. Li faris historian esploron en la Biblioteko Vatikana. Inter la pagxoj de malnova libro, li trovis dokumenton en la sekreta lingvo de la Lumosercxantoj. Li antauxe kelktempe interesigxis pri tiu sekreta societo internacia, kaj iom komprenis gxian sekretan lingvon. Li komprenis, ke tiu papero indikas, kie trovigxas la trezoro de la Lumosercxantoj, sed mem ne povis traduki cxiujn detalajn indikojn. Li ricevis la permeson fotokopii la dokumenton. Foje, kiam ni renkontigxis, li parolis pri tio al mi. Li diris, ke eble homoj provos trovi tiun trezoron, cxar pli kaj pli multaj personoj interesigxas pri la malnovaj sekretaj societoj. Li sciis, ke mi estas la sola persono en la mondo, kiu vere gxisfunde studis tiujn malnovajn sekretajn lingvojn, kaj li petis min solene promesi, ke mi neniam kunlaboros kun homoj sercxantaj la trezoron pro materia intereso."

"Kion li volis, ke oni faru pri gxia?" Linda demandis.

"Ke gxia transiru al iu muzeo aux sxtata institucio."

Tom intervenis:

"Kiel Marta ricevis la fotokopion?"

"Tion sxi mem klarigis al mi," respondis la policano: "sxi konstatis, ke la substanco uzita antaux la operacio por dormigi la profesoron estas unu el tiuj, kiujn oni kelkfoje uzas por t.n. (= tiel nomata) narkoanalizo. Post la operacio, kiam la profesoro kusxis en sia cxambro -- li havis privatan cxambro kaj do estis sola -- sxi injektis al li tiun substancan, kaj pridemandis lin. Sub la influo de la koncerna substanco, oni dormas, sed dormante auxdas kaj respondas demandojn, gxenerale dirante la veron. Li do dorme respondis al sxi. Per tiu metodo sxi eksciis pri tio, ke nur unu persono en la mondo, nome Gerda, komprenas tiun sekretan lingvon, kaj pri multaj aliaj aferoj."

DEMANDOJ (24)

Kiel aspektis la trezoro?

Kion legis Ronga?

Kiam Marta eksciis pri la trezoro de la lumosercxantoj?

Kie profesoro Kosadi faris historian esploron?

Kion profesoro Kosadi eksciis pri la trezoro? Kion li ne povis kompreni?

Kiel Marta eksciis pri la trezoro?

NOTOJ

En la antauxa cxapitro vi lernis pri cxiuj ses participoj en Esperanto, sed ni uzis ilin nur kiel adjektivojn. Adjektivon oni povas uzi aux apud substantivo ("SXi vidas blondan viron"), aux kun iuj verboj, ekzemple "esti" ("La viro estas blonda"). Ankaux participajn adjektivojn oni povas uzi en tiuj du manieroj:

Mi vizitas la ensxlositan virinon.

La virino estas ensxlosita.

La participaj adjektivoj havas la saman signifon en ambaux situacioj.

Oni povas montri la subjekton de objekta (pasiva) participo per la prepozicio "de":

Mi vizitas la virinon ensxlositan de la blondulo.

La virino estas ensxlosita de la blondulo.

Tiuj frazoj signifas preskaux same kiel:

Mi vizitis la virinon, kiun la blondulo ensxloxis.

La blondulo ensxloxis la virinon.

Tiuj lastaj frazoj estas tamen pli simplaj kaj pro tio pli bonaj.

Eblas uzi ankaux subjektan (aktivan) participon post la verbo "esti":

La blondulo estas ensxlosinta la virinon.

Tiaj "kunmetitaj verbotempoj" estas tamen tre maloftaj. Preskaux cxiam sufixas simple:

La blondulo ensxlosis la virinon.

Participoj uzigxas ne nur adjektive, sed ankaux adverbe kaj substantive. Ni konsideru unue ilian substantivan uzadon.

Participaj substantivoj havas kompreneble la finajxon "-o": malaperinto, krieganto, kaptoto. Oni devas memori, ke participa substantivo cxiam signifas personon, aux ulon. "Malaperinto" estas do "malaperinta ulo", "krieganto" estas "krieganta ulo", kaj "kaptoto" estas "kaptota ulo". Se oni volas paroli pri ajxo, oni povas uzi kroman finajxon "-ajx-". "Donitajxo" estas ekzemple ajxo donita, io donita.

Participaj adverboj havas la finajxon "-e": enirante, forironte, vidinte. Pri participaj adverboj oni devas memori, ke ili cxiam rilatas al la subjekto de la frazo. Ekzemple, la frazo:

Bob vidis Lindan enirante la restoracion.

Devas signifi:

Bob vidis Lindan, dum li (Bob) eniris la restoracion.

Jen aliaj ekzemploj:

Forironte Bob turnis sin al la pordo.
(Bob turnis sin al la pordo por foriri.)

Vidinte Lindan Bob iris al sxia tablo.
(Post kiam li vidis Lindan, Bob iris al sxia tablo.)

Kompreneble oni povas uzi ankaux objektajn (pasivajn) participajn adverbojn:

Bob forlasis la restoracion ne vidite de Linda.

Observate de la studentoj li ne kuragxis foriri.

Kaptote de la malamiko li decidis sin mortigi.

En skriba Esperanto oni ofte uzas tiajn frazojn kun participaj adverboj, sed en parolata Esperanto ili ne estas tiom uzataj. Oni preferas paroli per simplaj mallongaj frazoj.

EKZERCOJ (24)

Ekzemplo:

CXAR la studentoj LIN OBSERVIS, li ne kuragxis foriri.

---> Observate de la studentoj li ne kuragxis foriri.

Forigu la vortojn skribitajn GRANDE!

La HOMOJ, KIUJ FORIROS, ne plu zorgos pri sia laboro.

La INFANOJ, KIUJ LERNAS, ekstaras, kiam la instruisto envenas.

POST KIAM LI longe PRIPENSIS la aferon, li decidis ekagi.

Oni ensxlosis la HOMON, KIUN ONI KAPTIS, en la policejo.

La HOMO, KIU MALAPERIS, estas instruisto pri malnovaj sekretaj lingvoj.

DUM LI ATENDIS la buson, Tom ekhavis ideon.

La HOMOJ, KIUJN LA AFERO INTERESAS, povas trovi pli da informoj en iu ajn biblioteko.

La blondulo forveturis, DUM Tom kaj Linda OBSERVIS LIN.

La HOMOJ, KIUJN ONI LIBERIGOS, ankoraux atendis la malfermon de la pordego.

CXAR la polico LIN KAPTOS, la spiono mangxis la dokumenton.

POST KIAM cxiu FORGESIS GXIN, la libro atendis multajn jarcentojn en la biblioteko.

TUJ ANTAUX OL LI MALFERMIS la pordon, li subite konsciis pri stranga bruo venanta de gxia alia flanko.

CXAPITRO 25 (DUDEK KVIN)

"Sed vi ne respondis pri la fotokopio!"

"Ho, pardonu. La profesoro havis gxin en sia paperujo. Li fartis tre malbone post la operacio. Marta simple prenis la dokumenton el lia paperujo, dum li dormis; sxi ja sciis, ke li ne vivos longe. Li fartis malbone. Lia sanstato ne lasis multe da espero. Fakte, li baldaux mortis post tio. Neniu do zorgis pri la malaperinta papero."

"Kiel Ronga enmiksighis en la arangxon?"

"Li estis la amanto de Marta, kaj sxi rakontis al li. Li vivas tiamaniere, ke li dauxre bezonas multe da mono. Li organizis la aferon. Estas li kaj kolego Fergus, kiuj forportis Gerdan, post kiam ili batis Bob senkonscia. La oficejo de Fergus estas tute proksima. Tien ili portis sxin, kaj tie ili atendis, gxis la vojo estis libera kaj ili povis veturigi sxin al la forlasita domo."

Gerda parolis:

"La frato de Marta plurfoje vizitis min, antaux kelkaj monatoj. Li provis igi min traduki por li la dokumenton. Sed kiam mi demandis, de kie li ricevis gxin, li hezitis, iom palighis, ne respondis tuj, kaj mi komprenis, ke li ne agis honeste. Mi memoris la vortojn de Prof. Kosadi, kaj malakceptis kunlabori. Sed li revenis unufoje, dufoje, trifoje. Mi cxiufoje rifuzis. Kiam mi poste ricevis inviton instrui pri malnovaj sekretaj lingvoj en la kadro de kurso de Prof. Ronga, mi tute ne imagis, ke estas rilato inter Ronga kaj la junulo, kiu tiel ofte venis al mia hejmo insisti, por ke mi traduku la paperon pri l'trezoro."

"Jes," diris Tom. "Pro via plurfoja rifuzo ili elpensis tiun planon. Kapti vin kaj perforte devigi vin traduki la tekston."

"Tiom da riskoj kaj zorgoj por nenio!" komentis Gerda. "Kia malsagxeco! Kia stulteco!"

"Jes. Amatoroj," diris la policano malestime. "Ili agis amatore ekde la komenco. Pro tio ni tiel facile ilin kaptis. Sed pri tiu amatoreco vi danku Dion, Gerda. Pro tiu amatoreco ni povis liberigi vin, kaj vi plu vivas. Neamatoroj en simila situacio ne hezitus: vin uzinte, ili vin mortigus."

"CXu vere?"

"Jes. Vi sciis tro multe. Estus tro dangxere lasi vin vivi. Sincere, vi povas danki Dion, ke nur amatoroj planis kaj realigis tiun aferon."

Gerda silentis, pensema.

"Terure!" sxi fine diris. "CXiaokaze, mi plej sincere dankas vin, cxiun el vi. Vi agis mirinde. Vi savis min kaj mian filinon. Sed, Bob, kion vi opinias pri la tuta afero? Vi ankoraux diris nenion."

Bob rigardis sxin, kiun iom stranga esprimo.

"Mi plezure trinkus glason da brando," li diris. Kaj li restis malgxojeta, dum cxiuj aliaj ekridis.

KARA KAJ ESTIMATA LEGINTO,

Vi legis cxi tiun aventuron gxis la fino. Sendube vi estas kontenta, ke cxio finigxis bone. Sed cxu vi rimarkis, ke en la rakonto grava kontrauxdiro trovigxas? Alivorte, en unu loko la auxtoro diras ion, kaj en alia li diras la kontrauxon. Vi ne rimarkis, cxu vere? Bedauxrinde! Nun vi devos relegi la tutan tekston por trovi, pri kio temas. Legu atente, kaj se post unu legado vi ne trovis, relegu duan fojon, trian fojon, ktp. Certe vi fine trovos. Kaj se ne, nu, la vortoj kaj esprimmanieroj de esperanto pli bone metigxos en vian kapeton...

DEMANDOJ, SED NE EKZERCOJ

CXar tiu cxi estas la lasta cxapitro de la GERDA-kurso, ne estas demandoj pri la teksto, kaj ne estas ekzercoj. En ilia loko estas demandoj pri la tuta kurso, pri via opinio pri la kurso. Mi esperas, ke vi zorge respondos ilin, cxar viaj respondoj helpos nin plibonigi la kurson.

Respondu per multegaj vortoj!

Kiom da Esperanto vi jam sciis, kiam vi komencis la GERDA-kurson? Kiel vi lernis Esperanton antauxe?

CXu la GERDA-kurso estis por vi utila? CXu vi sukcesis multe lerni per gxi? CXu vi gxuis gxin?

CXu vi pensas, ke la teksto uzita (la rakonto "Gerda malaperis!") estis bone elektita? CXu gxia lingvajxo estas tro simpla? CXu la rakonto estas tro stulta, infaneca aux malinteresa?

CXu la demandoj pri la teksto estis utilaj? CXu eble estus pli bone havi nur ekzercojn post cxiu cxapitro, sen demandoj? CXu la demandoj estu malpli simplaj, por ke oni povu respondi ilin per pli da vortoj?

CXu la ekzercoj estis utilaj? CXu la vortaro-ekzercoj, en kiuj oni devas parigi vortojn kaj difinojn, estis utilaj? Kiuj estis la plej utilaj ekzercoj, kaj kiuj estis la malplej utilaj? CXu vi povas proponi aliajn specojn de ekzercoj?

CXu la "vortlisto" estis suficxe bona? CXu gxi enhavu pli da gramatikaj klarigoj, aux pli da ekzemploj? CXu gxi estu havebla en aliaj lingvoj? CXu eble vi ecx povus helpi traduki gxin al alia lingvo?

CXu vi uzis aux havas iujn aliajn lernilojn, ekzemple vortaron aux lernolibron pri Esperanto? Kiujn?

CXu vi volas plulerni Esperanton? Kiel? CXu kurso simila al la GERDA-kurso, sed kun bonaj literaturaj tekstoj anstataux la GERDA-rakonto, estus utila por vi? CXu vi preferus simple trastudi iun libron en Esperanto? CXu vi volus trastudi libron diskutante gxin kun iu? CXu vi volas lerni pli pri la historio kaj celoj de la Esperanto-Movado?

From etg10@cus.cam.ac.uk Thu Apr 27 23:39 CST 1995

Received: from hammer.levels.unisa.edu.au (hammer.levels.unisa.edu.au [130.220.12

Received: from bootes.cus.cam.ac.uk (root@bootes.cus.cam.ac.uk [131.111.8.1]) by

Received: by bootes.cus.cam.ac.uk

(Smail-3.1.29.0 #36) id m0s4UHM-000BzvC; Thu, 27 Apr 95 15:10 BST

Message-Id: <m0s4UHM-000BzvC@bootes.cus.cam.ac.uk>

Date: Thu, 27 Apr 95 15:10 BST

From: etg10@cus.cam.ac.uk (E.T. Grimley Evans)
 To: b.wechner@aitec.edu.au
 Subject: GERDA vortlisto.en
 Content-Type: text
 Content-Length: 36271
 Status: RO
 X-Status:

 1 (UNU)

al to; towards
 alta high; tall
 angulo corner, angle
 bela beautiful; handsome
 blonda fair, blond(e)
 demandas ask(s)
 demando question
 diras say(s), tell(s)
 ebla possible
 eble maybe, perhaps, possibly
 en in
 estas am, is, are
 fakte as a matter of fact
 fakto fact
 granda big, large, great
 ho oh!
 iras go, goes
 jen here is, here are, behold
 jes yes
 juna young
 kaj and
 kara dear
 kio what
 kiu who
 knabino girl
 knabo boy
 kun with
 la the
 laboras work(s)
 li he, him
 mi I, me
 mondo world
 multaj many
 multe much
 ne no, not
 nenio nothing
 nova new
 nu well (as in: well, as far as I'm concerned...)
 nun now
 nur only
 okazas happens
 plej most
 restoracio restaurant
 rigardas look(s) (at)
 saluton hullo!, hi!
 sed but
 serioza serious, earnest
 scias know(s)
 sidas sit(s)
 sincera sincere
 sola alone; (the) only (...)
 speciala special
 spegulo mirror
 studento student

tiu that one, that
 tro too, too much, too many
 tuta whole, entire
 tute quite
 universitato university
 venas come(s)
 vera true, real
 vere really
 versxajna probable, likely
 versxajne probably
 vi you
 virino woman
 viro man, male

-o noun

vera, "true" > la vero, "the truth"
 ebla, "possible" > eblo, "possibility"
 li demandas, "he asks" > demando, "a question"
 mi scias, "I know" > scio, "knowledge"

-a adjective

viro, "man" > vira "masculine"
 angulo, "angle" > angula, "angular"

-e adverb

bela, "beautiful" > bele, "beautifully"
 knabina, "girlish" > knabine, "in a girlish way", "girlishly"
 vi demandas, "you ask" > demande, "questioningly"

-as verb, present tense

serioza, "serious" > mi seriozas, "I'm being serious", "I'm speaking seriously"
 kunsido (kun + sido), "a session", literally: "a sitting-with", "a sitting together" > vi kunsidas, "you hold a session", "you have a meeting"

-u verb, imperative

iru!, "go!"
 venu!, "come!"
 vi sidas, "you're sitting" > sidu! "be seated"

mal- opposite

alta, "high" > malalta, "low"
 vero, "truth" > malvero, "falsehood"

-in- female

knabo, "boy" > knabino, "girl"

Kiu estas Gerda?, "Who is Gerda?"

Kiu scias?, "Who knows?"

Kiu knabo laboras?, "Which boy is working?"

Al kiu knabino li iras?, "Which girl does he go to?"

En kiu universitato sxi laboras?, "In which university does she work?"

la viro, kiu rigardas, "the man who is looking"

la universitato, en kiu mi laboras, "the university in which I work"

la knabo, al kiu vi rigardas, "the boy (which) you are looking at"

2 (DU)

agas	act(s)
alia	other, another
bona	good
bone	well
certa	certain
certe	certainly
cxu	interrogative particle
diabile !	gosh!
diablo	devil
direkto	direction
diskreta	discreet
dum	during; while
ej !	hey! oh!
forta	strong
haltas	stop(s)
igxas	become(s)
ili	they
inter	between, among
io	something
iom	a bit, somewhat, rather
iom post iom	little by little
iomete	a little
ke that	(as in: I know that..., he says that...)
kvaza~u	as though, as if
lia	his
mano	hand
mistera	mysterious
mistere	mysteriously
mistero	mystery
montras	show(s)
natura	natural
nature	naturally
naturu	nature
ne plu	not any more, no more
ni	we
pala	pale
parolas	speak(s), talk(s)
petas	ask(s) for
plu	further, more
pordo	door
post	after
prava	right (in opinion, conduct, etc.)
prave	right (adverb)
pravas	am, is or are right
proksima	near
rapida	quick
revenas	come(s) back
se	if
staras	stand(s)
stranga	strange
strange	strangely
sxi	she
sxia	her, hers
taso	cup
tre	very
turnas	turns
ulo	fellow, guy, individual
vidas	see(s)
volas	want(s)

cxu :

li venas, "he 's coming" > cxu li venas?, "is he coming?"
 vi scias, "you know" > cxu vi scias?, "do you know?"

-igx- become(s) ..., get(s) ...

proksima, "near" > ili proksimigxas, "they're drawing nearer"
 stara, "standing" > li starigxas, "he stands up"
 viro, "man", "male" > la knabo virigxas. "the boy is becoming a
 man"

rapida, "quick" > rapidigxo, "acceleration"

re- repetition, return

sxi vidas, "she sees" > sxi revidas, "she sees again"
 ni venas, "we're coming" > ni revenas, "we're coming back"
 li fortigxas, "he becomes strong" > li refortigxas, "he
 recovers his strength"
 bela, "beautiful" > sxi rebeligxas, "she's becoming beautiful
 again", "she's recovering her beauty" > rebeligxo, "the fact of
 recovering one's beauty"

-ulo a person

juna, "young" > junulo, "a youth"
 forta, "strong" > fortulo, "a hefty guy"

-n direct object of a verb

li vidas vin, li vin vidas, vin li vidas, vidas li vin, vidas vin li,
 "he sees you"

vi vidas lin, vi lin vidas, lin vi vidas, vidas vi lin, vidas lin vi,
 "you see him"

Mi ne povas vidi, cxu estas io inter mi kaj vi. "I can't see whether
 there is something between you and me."

Mi ne povas vidi, se estas io inter mi kaj vi. "If there is something
 between me and you, then I can't see."

 3 (TRI)

ami to love
 amo love (noun)
 anka~u also
 aspekti to look like
 aspekto look, appearance; aspect
 bonan tagon good afternoon, good morning, good day
 cxe at, by, next to
 de of, from
 deklari to state
 deklaro statement, declaration
 esprimi to express
 esprimo expression
 grava important
 gravi to matter
 gxi it
 jam already
 kiel as, like; how
 kompreneble of course (litt. understandably)
 kompreni to understand
 ne gravas it doesn't matter, never mind
 pardoni to forgive
 permesi to allow

pli more
 povas can, may
 povi to be able to
 preferi to prefer
 pri about, concerning
 saluti to greet
 simpla simple
 spiono spy
 sur on
 tablo table
 tago day
 tamen however, all the same, nevertheless
 tio that
 tuj immediately
 vizagxo face

tio ne gravas that doesn't matter
 ne tio gravas that is not the thing that matters

li aspektas kiel studento he looks like a student

sxi aspektas june (also in use, although purists disapprove: sxi
 aspektas juna) she looks young

-j plural

viro, "man" > viroj, "men"
 virino, "woman" > virinoj, "women"
 juna viro, "young man" > junaj viroj, "young men"
 bela tago "beautiful day" > belaj tagoj, "beautiful days"

-i infinitive

kompreni estas pardoni, "to understand is to forgive"
 mi salutas lin, "I greet him";
 mi volas saluti lin, "I want to greet him"
 li komprenas, "he understands";
 li povas kompreni, "he can understand";
 la povo kompreni, "the ability to understand"

-is verb, past tense

mi estis, "I was"
 li venis, "he came"
 sxi amis vin, "she loved you", "she used to love you"

-ebl- possibility

kompreni, "to understand" > komprenebla, "understandable"
 vidi, "to see" > videbla "visible" > nevidebla "invisible"
 ami, "to love" > amebla "who can be loved", "lovable"

mal- used to form opposites

ami, "to love", ne ami, "to be unloving", malami, "to hate"
 forta, "strong", ne forta OR neforta, "not strong", malforta, "weak"

amdeklaro = deklaro de amo = deklaro pri amo

 4 (KVAR)

afero thing, matter; business
 ajxo thing, object (synonymous with "afero", but rather more concrete)
 anta~u in front of; before (prep.)

anta~ue before, beforehand (adv.)
 arto art
 deziri to wish
 do so, then, thus
 ekzisti to exist
 fako specialization, branch, department; pigeon-hole, compartment
 ideo idea
 instrui to teach
 kiam when
 komuniki to communicate
 koni to be acquainted with, to know
 konsideri to consider
 konsenti to agree
 kripta cryptic
 kriptografio cryptography
 lerni to learn
 lingvo language
 lingvistiko linguistics
 malpli less
 mesagxo message
 neniam never
 nomo name
 oni one, people, they, we, you
 por for; in order to
 profesoro professor
 respondi to answer
 rilati to relate
 rilato relationship
 scienco science
 sekreta secret (adj.)
 sekreto (a) secret
 temas pri it's about... (such or such a topic)
 temo subject, topic
 voli diri to mean

ne tute not quite
 tute ne not at all

-ajxo concrete manifestation, external manifestation, something
 having the quality of..., something that...

nova, "new" > novajxo, "news", "novelty"
 okazi, "to happen" > okazajxo, "event"
 arto, "art" > artajxo, "objet d'art"

kriptajxo = kripta afero, io kripta
 kriptajxoscienco = scienco pri kriptajxoj

5 (KVIN)

absurda absurd
 ankora~u still
 ankora~u ne not yet
 atenti pay attention
 atento attention
 cetere besides
 cxi (denotes nearness)
 cxi tie here
 cxi tio this (thing)
 cxi tiu this; this one
 da of (after expression of quantity)
 dramo drama
 drogo drug
 evidenta obvious

eta small
 for away
 havi to have
 imagi to imagine
 imago imagination
 iu some; somebody
 kasxe stealthily
 kasxi to hide, to conceal
 normala normal
 ofta frequent
 ofte often
 paro couple, pair
 peco piece, bit
 plena full
 plene fully, completely
 posxo pocket
 promeni to go for a walk
 pulvoro powder
 sekundo second (of time)
 subita sudden
 subite suddenly
 substanco substance
 sukcesi to succeed
 sukero sugar
 super over; above
 sxajni to seem
 tiam then
 tie there
 tie cxi here
 tiel so, that way, thus
 tio cxi this
 tiu cxi this (before a noun)

tio cxi = cxi tio
 tiu cxi = cxi tiu
 tie cxi = cxi tie

tiu cxi viro estas juna, "this man is young"
 tio cxi estas nekomprenebla, "this is incomprehensible"

-us verb, conditional

se mi konus lin, mi irus, "if I knew him, I'd go"
 mi dezirus demandi vin, "I'd like to ask you"

-n direct object of a verb

mi konas tiun junan viron, "I know that young man"
 tiun junan viron mi konas, "I know that young man"
 tiun junan viron konas mi, "I know that young man"
 tiu juna viro konas min, "that young man knows me"
 tiu juna viro min konas, "that young man knows me"
 min konas tiu juna viro, "that young man knows me"

kiu vidis lin?, "who saw him?"
 kiun vidis li?, "whom did he see?"

la viro, kiun rigardis la knabino, "the man the girl was looking at"
 la viro, kiu rigardis la knabinon, "the man who was looking at the girl"

ek- commencement, suddenness

iri, "to go" > ekiri, "to set off"
 sidi, "to sit" > eksidi, "to sit down"

-et- diminutive

virino, "woman" > virineto, "little woman"
 bela, "beautiful" > beleta, "pretty"
 mi komprenas, "I understand" > mi komprenetas, "I understand
 more or less", "I think I understand"

for- away

iri, "to go" > foriri, "to go away"
 esti, "to be" > foresti, "to be absent" > foresto, "absence"

-ujo container

sukero, "sugar" > sukerojo, "sugar basin"

6 (SES)

amba~u both
 a~udi to hear
 bruo noise
 decidi to decide
 decido decision
 devas must
 devi to have to, to be obliged to
 devo duty
 diskuti to discuss
 diskuto discussion
 fali to fall
 falo (the, a) fall (not season)
 kafo coffee
 koridoro hallway, hall, corridor
 meti to put
 observi to observe
 pensi to think
 perdi to lose
 resti to stay, to remain
 riski to risk
 sama same
 tempo time
 timi to fear, to be afraid
 trankvila calm, tranquil

cxu li iras? "is he going?"
 cxu li iru? "should he go?"
 cxu li irus? "would he go?"

kion mi diras? "what am I saying?"
 kion mi diru? "what should I say?"

la taso falis sur la tablo, "the cup, which was already on the table,
 fell (staying on the table)"
 la taso falis sur la tablon, "the cup fell onto the table"

li promenis en la gxardeno, "he was walking in the garden"
 li promenis en la gxardenon, "he walked into the garden"

7 (SEP)

almena~u at least
 apena~u hardly, scarcely
 a~utoritato authority
 bati to beat

doktoro doctor
 dormi to sleep
 fari to do, to make
 flegi to nurse (in sickness)
 flegisto male nurse
 flegistino nurse
 gxis till, until
 gxusta correct, right, exact
 informi to inform
 informo information
 kapo head
 komforta comfortable
 konscia conscious
 konscii to be conscious, to be aware
 konscio consciousness
 koro heart
 kuraci to attend (a patient)
 kuracisto physician
 kusxi to lie, to recline
 memori to remember
 ol than
 opinii to think, to opine
 opinio opinion
 piedo foot
 pozicio position
 semajno week
 sendi to send
 unu one
 unua first
 unue at first, to begin with
 vivi to live
 voki to call

-os verb, future tense

mi estos, "I'll be"
 cxu vi venos? "will you come?"
 ili komprenos, "they'll understand"

-isto habitual occupation, profession

instrui, "to teach" > instruisto, "teacher"
 labori, "to work" > laboristo, "worker"

Note: In the plural, the n form is added to the j:

mi konas belajn knabinojn, "I know beautiful girls"
 grandajn manojn li havas, "he has big hands"

la viroj, kiujn ŝi amas, "the men she loves"
 la viroj, kiuj ŝin amas, "the men who love her".

The n form is used not only to show the direct object of a verb or the direction of a movement, but also in expressions of time, duration, measure and value, when there is no preposition:

mi restis la tutan semajnon, "I stayed the whole week" (in such cases, the n form replaces a preposition which is understood; thus, if you use the preposition, you should not use the n form; you can express the same idea saying: mi restis dum la tuta semajno, "I stayed during the whole week".)

li venis la postan tagon, "he came the following day"
 gxi estas unu metron alta, "it is one meter high"

atendi to wait
 a~u or
 a~uto car
 a~utomato automaton
 balda~u soon
 buso bus
 cxambro room
 cxar because
 cxiaokaze in any case
 destino destiny
 ecx even
 ekster outside (preposition)
 ekstere outside (adverb, situation)
 eksteren outside (adverb, direction)
 el out of, from
 helpi to help
 korpo body
 kruro leg
 longa long
 mem self
 memserva restoracio cafeteria
 nokto night
 pasxi to step, to walk
 pasxo step
 per by means of, with
 rugxa red
 sekvi to follow
 senti to feel
 servi to serve
 si himself, herself, oneself, themselves
 suspekti to suspect
 tien there, to(wards) that place
 tomato tomato
 tra through
 urbo town, city
 vespero evening

 -ejo place (often collective)

 dormi, "to sleep" > dormejo, "dormitory" ("bedroom" is dormocxambro)
 lerni, "to learn" > lernejo, "school"

 li a~utas en la urbo, "he drives in town"
 li a~utas en la urbon, "he drives into the town"
 li a~utas tie, "he drives there, in there"
 li a~utas tien, "he drives there, thither"

 sxi mem diris gxin, "she said it herself"
 sxi diris gxin al si, "she said it to herself"

 ili komprenos tion mem, "they'll understand that by themselves"
 ili komprenos sin, "they'll understand themselves"
 ili komprenos unu la alian, "they'll understand one another"
 ili komprenos ilin, "they'll understand them"
 li amis sxin, "he loved her"
 li amis lin, "he loved him"
 li amis sin, "he loved himself"

 li amis sxian flegistinon, "he loved her nurse"
 li amis lian flegistinon, "he loved his (i.e. his friend's) nurse"
 li amis sian flegistinon, "he loved his (own) nurse"

 "I'll go there by car":

mi tien iros a~ute (I'll go there 'car-wise')
 mi tien iros per a~uto (I'll go there by means of a car)
 mi tien iros en a~uto (I'll go there in a car)
 mi tien a~utos (I'll 'car' there)

9 (NA~U)

administra administrative
 administri to administer
 ajn ...-ever, no matter wh...
 iu ajn anybody; any
 io ajn anything
 amiko friend
 bani to bathe (somebody)
 bani sin to have a bath, to bathe
 blua blue
 dika thick
 epoko epoch, age
 generacio generation
 grasa fat
 haro hair
 homo human being
 kelkaj some, a few
 kial why
 kie where
 kie ajn wherever
 kiu ajn whoever
 kiun ajn whomsoever
 klaso class
 kompati to pity
 kompatinda poor, to be pitied
 kredi to believe
 lasi to leave, to let
 loko place
 meze de in the middle of
 mezo middle
 minuto minute (time)
 muro wall
 neniu nobody; no ..., not any
 ofico function, post
 oficejo office
 okulo eye
 okupi to occupy
 okupigxi pri to attend to something, to busy oneself with
 okupi sin pri = okupigxi pri
 provi to try
 ronda round
 rondo round, ring, circle
 sana healthy
 sen without
 sveni to faint
 tradicio tradition
 trovi to find
 tusxi to touch
 urgxa urgent
 vorto word
 vortaro dictionary
 zorgi to care for, to be concerned over, to be anxious about
 zorgo worry; care

kien ajn vi iros, mi sekvos vin, "wherever you go, I'll follow you"
 mi faros kion ajn vi diras, "I'll do whatever you say"
 li diras ion ajn, "he says anything"
 iru ien ajn, "go anywhere", "go wherever you please"

-ita past passive participle

fari, "to do", "to make" > farita, "done", "made"
 vidi, "to see" > vidita, "seen"
 perdita peco, "a lost piece"
 ni estas informitaj, "we are informed"

-ad- action, particularly prolonged or repeated

paroli, "to speak" > paroladi, "to make a speech", "to speak at length"
 la penso, "the thought" > la pensado, "(the process of) thinking"
 memoro, "memory" > memorado "the fact of remembering"

la respondo estis longa, "the answer was long"
 la respondado estis longa, "the answering was long", "it took a long time for all the answers to be expressed"

li rigardis, "he looked", li ekrigardis, "he glanced", li rigardadis, "he looked at length", "he looked on and on"

-ar- collective, group

vorto, "word" > vortaro, "dictionary", "vocabulary"
 homo, "human being" > homaro, "mankind"
 la studentaro, "the student body (of a university)"
 la kuracistaro, "the medical profession", "all the doctors (in the area)"

-inda worthiness

ami, "to love" > aminda, "loveable"
 vidi, "to see" > vidinda, "worth seeing"
 havi, "to have" > havinda, "worth having"

inda / ebla:

havinda, "worth having", havebla, "available"
 aminda, "who deserves to be loved"
 amebla, "who can be loved"

sen without

senkora, "heartless"; senforta, "strengthless"; senhelpa, "helpless"; senkompate, "mercilessly"

 10 (DEK)

aventuro adventure
 dangxero danger
 danki to thank
 ege extremely
 ema inclined
 emi to be inclined to
 facila easy
 fidi to trust, to rely on
 fusxi to botch, to mess up, to bungle
 reciproke mutually
 silenti to be silent
 silento silence
 sinjoro mister
 sxati to like
 unua first

-eg- augmentative

bona, "good" > bonega, "excellent"
 bela, "beautiful" > belega, "splendid"
 urbo, "town" > urbego, "a large city"
 labori, "to work" > laboregi, "to work hard", "to exert oneself"

-em- tendency

paroli, "to speak" > parolema, "talkative"
 agi, "to act" > agema, "active", "enterprising"
 timi, "to be afraid" > timema, "fearful", "timid"

mis- wrongly

kompreni, "to understand" > miskompreni, "to misunderstand"
 pasxo, "a step" > mispasxo, "a blunder"

11 (DEK UNU)

afabla kind, affable
 akcepti to accept
 aldoni to add
 arangxi to arrange
 banala trite, commonplace
 bonvoli to be so good as
 cxiam always
 dankon thank you
 ne dankinde you're welcome
 entute at all
 fermi to close, to shut
 fini to finish
 funkcii to function, to work
 gxeni to inconvenience, to hamper
 igi to render, to cause (somebody to do something,
 something to develop in a certain way), to make (such and such)
 kontenta glad, satisfied
 kiel eble plejas... as possible
 konsentite OK, all right, agreed
 malfermi to open
 maniero manner
 manki to be lacking
 mekaniko mechanics
 miksi to mix
 miri to be amazed
 motoro motor
 objekto object, thing
 oportuna convenient, handy
 ordo order
 panei to break down, to stop functioning
 paneo mechanical failure
 ripari to repair, to mend
 ripeti to repeat
 sagxa wise
 seka dry
 tia such
 trovigxi to be found, to be (at ...)
 turni sin al to address, to speak to, to apply, to ask, to contact
 veturi to go (by some sort of vehicle)

-ante present active participle, adverbial form

laborante, li silentis, "when working, he kept silent"

ni diskutis promenante, "we talked while taking a walk"
 vi lernos la lingvon parolante gxin, "you'll learn the language
 by speaking it"

-ig- causative

granda, "big" > grandigi, "to enlarge"
 (pli) forta, "strong(er)" > (pli)fortigi, "to strengthen"
 facila, "easy" > faciligi, "to facilitate"
 scii, "to know" > sciigi, "to inform" or "to make known"
 stari, "to stand" > starigi, "to set up"
 kontenta, "glad" > kontentiga, "satisfactory"
 maltrankvila, "troubled", "restless", "anxious" >

maltrankviliga, "disquieting"

-ilo implement

labori, "to work" > laborilo, "tool"
 dormi, "to sleep" > dormigi, "to make somebody sleep" >
 dormigilo, "sleeping pill"
 veturi, "to go (not on foot)", "to travel" > veturilo,
 "vehicle"

 12 (DEK DU)

acxeti to buy
 akvo water
 apud beside, near
 brando brandy
 cxio everything
 denove again
 doloro pain
 doni to give
 duone half
 eksplodi to explode
 fra~ulino Miss
 glaso glass
 gxemi to groan, to moan
 heziti to hesitate
 ja indeed; sure enough
 kiom how much, how many
 klara clear, plain
 kvankam although
 largxa broad
 la~u according to; along
 morti to die
 plezuro pleasure
 polico police
 porti to carry
 pripensi to reflect, to ponder, to think over
 ricevi to receive
 segxo chair
 soifi to be thirsty
 soifo thirst
 suficxa sufficient
 tiom so much, so many
 trinki to drink

al- approach, drawing near, bringing closer

veni, "to come" > alveni, "to arrive"
 iri, "to go", > aliri, "to approach"
 porti, "to carry" > alporti, "to bring"
 paroli, "to speak" > alparoli, "to address"

kapjesi = kap + jes + i = "to nod" ("head" + "yes" + verb. ending)

scivola = sci + vol + a = "curious" ("know" + "want" + adj. ending = "who wants to know")

klarigi = klar + ig + i = "to explain" ("clear" + "render" + verb. ending = "to make clear")

survizagxe = sur + vizagx + e = "on (his, her) face" ("on" + "face" + adv. ending = sur (la, lia, sxia) vizagxo)

a > e:

facila laboro, "an easy job", facile labori, "to work easily"
 la laboro estas facila, "the work is easy"
 labori estas facile, "working is easy"
 estas facile labori, "it is easy to work"
 estas bone lerni la lingvon, "it is good to learn the language"
 ripari la a~uton estas dezirinde, "it is desirable to mend the car"; riparado de la a~uto estas dezirinda, "repairing of the car is desirable"

tiu demando estas nediskreta, "that question is indiscreet";
 tion demandi estas nediskrete, "it is indiscreet to inquire on that point"

estis klare, ke la laboron faros li, "it was clear that he was the one who would do the job"; estis klara decido, ke la laboron faros li, "it was a clear decision that he would do the job"

estus bone, se vi povus veni, "it would be good if you could come";
 estus bona afero, se vi povus veni, "it would be a good thing if you could come"

"ja" often refers to the cause of the thing dealt with in the preceding statement, but it is also used simply to emphasize a point:

mi ne povas gxin porti, gxi ja estas tro granda, "I cannot carry it, it is too heavy"

li certe venos, li ja tre deziras vidi vin, "he will certainly come, for he wants badly to see you"

vi ja scias ..., "you sure know ...", "no doubt, you know ..."

cxu li ne venos? - jes ja!, "won't he come?" - "oh yes, he will, definitely"

 13 (DEK TRI)

absorbi to engross
 beda~uri to regret
 centro center
 da~uri to last
 da~urigi to continue (something)
 ekzemplo example
 felicxa happy
 felicxe fortunately; happily
 forgesi to forget
 gxentila polite, courteous
 gxoja glad, merry, cheerful
 gxoyo joy
 hotelo hotel

ie some place, somewhere
 interesa interesting
 interesi to interest
 internacia international
 komenci to begin
 konato acquaintance
 koncerni to concern
 koncerne ...n concerning
 krome moreover
 kutimi to be accustomed to
 kutimo habit, custom
 momento moment
 nacia national
 nacio nation
 nekonato an unknown person
 perfekta perfect
 persono person
 peza heavy
 preciza precise
 proponi to suggest, to propose; to offer
 rajti to be entitled to
 rajto (the) right (to do something)
 rakonti to tell (a story), to narrate
 ridi to laugh
 rideti to smile
 rimarki to notice
 simila similar
 stulta stupid, silly, dull
 sxofori to drive
 sxoforo driver, chauffeur
 teatro theater
 vojo way, road

koncerne vian proponon, "concerning your suggestion"
 kiom koncernas min, "as far as I am concerned"

 14 (DEK KVAR)

aero air
 brako arm
 domo house
 du two
 esperi to hope
 fantomo ghost
 fenestro window
 fenestrovri shutter
 horo hour
 humuro humour
 iam sometime, once
 infano child
 kampo field
 kanti to sing
 kovri to cover
 krei to shout, to call out
 kuri to run
 kuragxa brave
 kuragxo courage
 laca tired
 la~uta loud
 libera free
 lito bed
 ludi to play
 lumo (the, a) light
 malanta~u behind

marsxi to march; to walk
 monto mountain
 movi to move (something)
 muskolo muscle
 nek... nek... neither... nor...
 nenie nowhere
 patro father
 patrino mother
 plendi to complain
 plori to weep
 pura clean; pure
 roko rock
 sinsekve consecutively
 situacio situation
 soni to sound
 suno sun
 sxlosi to lock
 sxlosilo key
 sxtono stone
 varma warm
 veki to wake (somebody) up
 vocxo voice

-ata present passive participle

konata, "(who is) known"
 rigardata, "that is being looked at"

-inta past active participle

aminta, "having loved"
 laborinta, "having worked"

-eco abstract name of quality

libera, "free" > libereco, "freedom"
 viro, "man (male)" > vireco, "virility"
 unu, "one" > unueco, "unity"

mi vekas lin, "I wake him up", li vekigxas, "he wakes up";
 mi movas gxin, "I move it", gxi movigxas, "it moves";
 li komencas la rakonton, "he begins the story", la rakonto
 komencigxas, "the story begins"

ata > ita (compare as > is)

farata laboro, "a job which is (in the process of) being done";
 farita laboro, "a job which has been done, which is finished"
 [comp.: mi faras la laboron, "I'm doing the job", mi faris la laboron,
 "I've done the job".]

vekata amiko, "a friend I am trying to wake up", "a friend who is being waked up"
 vekita amiko, "a friend who has been woken up, who is awake"

ellitigxi = igxi el lito = to get up (litt. to get out of bed)

fenestrokovrilo, "shutter" < "a device", "a thing" (ilo) "that covers"
 (kovr-) "a window" (fenestro)

-ega (augmentative), -iga (causative):

lacega, "exhausted", "awfully tired"
 laciga, "tiring" ("causing to be tired")
 kuragxega, "extremely brave", "bold", "intrepid"
 kuragxiga, "encouraging"

15 (DEK KVIN)

cent	hundred
cxefa	principal, chief
cxokolado	chocolate
dek	ten
dek kvar	fourteen
dekstra	right (hand)
maldekstra	left (hand)
dolcxa	sweet
flanko	side
frue	early
hiera~u	yesterday
kvar	four
kvardek	forty
kvardek kvar	44
magazeno	store, shop
mateno	morning
meblo	piece of furniture
nazo	nose
pano	bread
papero	paper
plani	to plan
plano	plan
plenplena	completely full
posxto	post, mail
raporti	to report
sako	bag
speco	kind, sort
sporto	sport
strato	street
sxanco	chance
tasko	task
teo	tea
vendi	to sell
bonsxanca	lucky, fortunate
devojigxi (< de + voj + igxi),	"to stray from", "to deviate"

16 (DEK SES)

acxa	wretched, no good, loathsome
atmosfero	atmosphere
bonkora	good-hearted
bruna	brown
biero	beer
finfine	eventually (litt. at the end of the end)
flugi	to fly
fojo	time, occasion (tri fojojn, three times; unufoje, once)
furioza	furious
gratuli	to congratulate
grupo	group
hundo	dog
je	indefinite preposition
jxus	just, a moment ago
kato	cat
kelnero	waiter
kia	what a ...; what kind of
koko	rooster
koloro	color
krom	apart from; except for

kuko cake
 kune together
 kvin five
 mangxi to eat
 menuo menu
 mil thousand
 milito war
 militservo military service
 muziko music
 na~u nine
 noti to note
 numero number (of house, of ticket, in a series, etc.)
 ok eight
 plafono ceiling
 plato slab, plate
 pse~udo- pseudo-
 reala real, actual
 rompi to break
 salato salad
 soldato soldier
 supo soup
 telero plate
 tri three
 turka Turkish
 vesti to dress, to clothe

-acx- disparagement

domo, "house" > domacxo, "hovel"
 hundo, "dog" > hundacxo, "cur"
 ridi, "to laugh" > ridacxi, "to sneer"

-ido young of animal

koko, "rooster" > kokido, "chicken" > kokidajxo, "chicken meat"
 (kokino, "hen")
 porko, "pig" > porkido, "piglet" > porkajxo, "pork" (porkino,
 "sow", virporko, "boar")
 bovo, "ox" > bovido, "calf" > bovidajxo, "veal" (bovajxo, "beef";
 bovino, "cow"; virbovo, "bull")
 cxevalo, "horse" > cxevalido, "colt" (cxevalino, "mare";
 vircxevalo, "stallion")

mil na~ucent na~udek du, "1992"

dek du mil, "12,000"

kvincent kvindek kvin, "555"

kiu (identity) / kia (quality):

Kiu li estas? - Jozefo. "Who is he?" - "Joseph."
 Kia li estas? - Bonkora. "What kind of a man is he?" - "Kind"
 Kio li estas? - Raportisto. "What is he?" - "A reporter."

Kiun libron vi legas? - Gerda malaperis.
 "Which book are you reading?" - "Gerda malaperis."
 Kian libron vi legas? - Lernolibron.
 "What kind of book are you reading?" - "A textbook."

Note that "okazo" has three meanings:

(1) event; (2) case; (3) opportunity

aperi to appear
 deksepa 17th
 dua second, 2d
 edzo husband
 edzino wife
 frato brother
 fratino sister
 gardi to guard
 sin gardi to take care, to look out for, to watch out, to mind,
 to be careful to avoid (some danger or unpleasantness)
 singarda careful
 historio history
 honesta honest
 ia some kind of
 jaro year
 jarcento century
 kapti to catch
 konduki to lead
 kontroli to check, to verify
 krimo crime
 kvara fourth
 lasta last
 marko mark; brand
 mono money
 motivo motive
 placxi to please, to be pleasing
 preska~u almost
 pro because of
 problemo problem
 ricxa rich
 rolo r[^]ole
 sep seven
 sercxii to look for
 solvi to solve
 suko juice
 sxtele stealthily
 sxтели to steal
 tipo type, model
 tria third
 uzi to use

-ano member of a group; inhabitant

urbo, "town" > urbano, "townsman"
